GÓTARJÁ

HUNGARA VIVO

3
1978
8 Ft

La kuracplant-ekstraktoj de SZILAS

pliigas la laborkapablon

Szilas

GYÁRTJA:
SZILASMENTI MGTSZ

LABORATORIO DE KURACPLANTO-PRILABORO
KAJ DE VOLATILAJ OLEOJ
H—2144 KEREPES

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf. 193
Aperas dumonate
XVIII. jaro 1978. Nro 3 (79)

ENHAVO

Fenyvesi, E.: Generalo, revoluciulo, esperantisto, *Aurél Stromfeld* 82
Tófalvi, E.: En la metiejo de la moderna dancarto. Intervjuo kun *Sándor Tóth,* direktoro de la Baleto de Pécs 84
Nuntempa bulgara poezio 86
Georgiev, S.: La bulgara-hungara amikeco ne estas de hieraŭ 87
László, I.: Termalturismo en Hungario 88
Radványi, B.: Ŝtontabulo (D-ro *Nagy, I.)* 89
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 3. La firmiĝo de la feŭdismo kaj la komencoj de la dispartiĝo 90
Bálint, Sz.: Pri Hungario en fora lando 92
Kazancev, L.: Meznokte, Soneto 92
Sándor Gáspár, prezidanto de la Monda Federacio de Sindikatoj 93
Képes, G.: Sovaĝĉevaloj *(Varga, J.)* 93
Benedek, E.: La filino de bovpaŝtisto *(Benczik, M.)* 94
Nilson, G.: Flama maro 95
Rausemar, E.: Survoje hejmen, Dankon, La vakuo estas supre *(Heide, Z.)* 95
Benczik, V.: La Esperanta tradukarto 95
Pintér, T.: Frazmodeloj *(Fejes, M.)* 96
di Giorgi, A.: La voĉo de l' silento 97
Lejzerovicz, I.: El la „Verda Biblio" (fragmento) 99
Farkas, É.: Panoramo 100
Diskuto pri la „Reĝedzino" *(Révész, S., Haszpra, O., Botos, I., Fenyvesi, E.)* 102
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 104
Gergely, M.: La internacia lingvo de l' belartoj 105
D-ro László, F.: Registara agado en servo de la medioprotektado de akvo 107
Recenzoj *(Tófalvi, É., di Giorgi, A., Mihalkov, G., Benczik, V., Szabó, I.)* 113
Varga-Haszonits, Zs.: Labordokumentoj de la Budapeŝta Esperanto-Fako 117
Benczik, V.: Internacia Teatra Renkontiĝo 117
Fejes, M.: Spegulo por la perfekta memekkono kaj konscia laboro 118
Bálint, Sz.: La ideala edzino 118
Krucenigmo 119
Grava informo, Korespondi deziras 120

Tiu ĉi numero devus esti...

... kongresa numero, ja inter la 14-a kaj 16-a de julio kunsidos en Budapeŝto la 27-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso. Ni povus vicigi en ĝi la programerojn de la kongreso, raporti pri la antaŭpreparoj, entuziasme kaj faksperte faritaj de la Budapeŝta Komitato de HEA, kaj eblus ankaŭ resumi la laboron kaj atingojn de la hungarlanda Esperanto-movado dum la lastaj du jaroj.

Kaj ni povus saluti ankaŭ alian kongreson: la 63-an Universalan Kongreson, kiu kunsidos post monato en *Varna.* Ni povus ĝoji pri la alta nombro de la hungaraj partoprenontoj en tiu UK, kaj ankaŭ skizi la grandan organizan laboron, kiun plenumis HEA por veki la deziron en kiel eble plej multaj hungaraj esperantistoj veturi tien.

Tamen, tiu ĉi numero ne estas kongresa numero. La supre montritaj du eventoj estas nepre festaj por nia movado, sed ili ne prezentas per si mem ion eksterordinaran, nekutiman: ili tute ne aperas kiel „mejloŝtonoj" sur la vojo, kiun ni iras. Tiuj kongresoj estas signifaj, tamen regulaj eroj de longa, senfina ĉeno: de la evoluprocezo de la hungara kaj internacia Esperanto-movado. Ili plenumos siajn taskojn, kaj surbaze de la farotaj decidoj nia laborado ricevos novajn konkretajn celojn kaj espereble ankaŭ novan elanon.

Do, tiu ĉi numero de nia revuo estas same nur ero de longa ĉeno: de la kultura aplikado de la lingvo Esperanto. Nia revuo salutas la du kongresojn per siaj specifaj, nerektaj metodoj. La artikolo pri Aurél *Stromfeld* celas la hungarlandan kongreson, en kies kadroj oni festos la 100-an datrevenon de la naskiĝo de tiu ĉi unike interesa figuro de la hungara laborista kaj esperantista movadoj. Paĝo el la bulgara poezio aperas omaĝe al la lando, kiu gastigos la ĉijaran Universalan Kongreson.

Sed vi bone scias, ke tiuj ĉi du kontribuaĵoj neniel povus klasiĝi esceptaj en nia revuo. La nuna numero – kiel ankaŭ la pli fruaj – enhavas ĉerpaĵojn el la hungara kulturo, informojn pri la pasinto kaj nuntempo de Hungario, kaj ne mankas ankaŭ kontribuaĵoj, kiuj celas riĉigi la originalan Esperantan kulturon. En la pasinta numero ni revivigis fragmenton el la komedio *Levu la manojn!* de F. V. *Dorno,* nun sekvu la unua ĉapitro de la iom forgesita sprita satiraĵo de I. *Lejzerowicz.*

Probable multaj jam aŭdis pri la fama baletensemblo de *Pécs* (kiu urbo en 1966 gastigis la 22-an IJK), kaj nun volonte legos pri ĝia arta laboro pli detale. Alia interesa artikolo informas pri faceto de la hungara bankulturo. Kaj ankoraŭ . . .

Sed multa parolo, multe da lolo. Timante vin plu tedi, antaŭ ol vi ekfoliumis tiun ĉi kajeron, la redaktoro decidas meti punkton al sia babilado.

GENERALO REVOLUCIULO ESPERANTISTO

AUREL STROMFELD 1878–1927

Post la katastrofa *malvenko* de Aŭstrio-Hungario en la unua mondmilito, la hungara ruĝ-armeo *venkante* militiris, direktita de eminenta hungara armeestro, por defendi la Hungaran Konsilio-respublikon. La triumfa generalo poste elstaris kiel socialdemokrata politikisto, baldaŭ aliĝinta al la subtera komunista partio, kaj – kio vekas nian apartan interesemon – alligis sin ankaŭ al la Esperanto-movado.

La historio de Esperanto konas el pluraj landoj altrangajn oficirojn, generalojn, kiuj faris gravajn servojn por nia movado, estante tre kleraj kaj organizkapablaj personoj. Ĉu nia *Aurél Stromfeld* prezentas sin inter tiuj bravaj esperantistaj generaloj?

La afero statas alimaniere. Stromfeld, grandulo de la hungara nacio, iris tute alian vojon dum sia ne longa vivo: *la alte taksata kolonelo de la imperiestro-reĝo, ricevis la veran honoron kiel generalo de la laborista klaso, de la revolucio.* La internacia lingvo altiris lin kiel ankaŭ konvena batalilo de la proletaro; tiel kaj tial li iĝis entuziasma aganto de la laborista E-movado.

„En la mondon venis nova sento" – kvazaŭ tempesto, pro la granda oktobra revolucio en 1917 – kiu alflugis ankaŭ Hungarion. Malgranda lando, kie ŝajnas eble mirinda, tamen ne senkaŭza, disvolviĝo de historiaj fazoj, paralelaj al tiuj en la kontinentgranda Ruslando. La Habsburg-dinastion renversis popola revolucio fine de oktobro 1918, estis proklamita respubliko, ĉekape kun Mihály *Károlyi* (vd. HV 1975/3. nro). Sed tiu burĝa regado ne povis kontentigi la proletojn, soldatojn kaj kamparanojn, la revolucia tajdo – krome la eksterlanda malamika premo – devigis ĝin cedi al la laboruloj. La unuiĝintaj socialdemokrata kaj komunista partioj venkigis la laboristo-potencon – unuafoje en Hungario, kreinte la *duan konsilio-respublikon* en la mondo (1919–03–21).

Esperplena jubilado kaj plensukcesa popolbalotado sekvis la historian tagon, supre kaj sube hasta transforma laboro por krei socialisman landon, kaj superregi la militkaŭzitan ekonimian disfalon, la popolmizeron. Ĝuste tio terurigis, memkompreneble, la Parizan konferencon de la venkinta Entento: *nova soveta lando en Mez-Eŭropo!* Tiutempe la Entento jam enmilitiĝis kontraŭ Sovet-Ruslando por gardi per armila interveno la postmilitajn interesojn de la imperiistoj. Des pli evidenta montriĝis, ke oni likvidu tiun novan revolucian flamon same per eksteraj invadoj. La freŝa burĝa registaro de Ĉeĥoslovakio kaj la reĝa Rumanio kaptis la instigon – ankaŭ la urĝe alsenditan armilaron – por militaj atakoj kontraŭ la danĝera revolucio en Hungario. Ĉe ties limoj staris nur infanteriaj trupoj, malfortaj restaĵoj el la mondmilito, malkapablaj firme rezisti – tiel komenciĝis la vivbatalo de la Konsilio-respubliko. Tiam paŝis decide en la historion Aurél Stromfeld, per eminentaj reorganizado kaj strategio triumfe sukcesigi la landdefendon.

Oficiro de la imperiestro

La junaĝo: tria infano de invalida inĝeniero, post kies baldaŭa morto, ĉe vidvino kaj avino edukiĝas en Budapeŝto; forlasas gimnazion akirinte stipendion en oficirmezlernejo, por tiel malŝarĝi sian malriĉan familion. Kvankam ties Kossuth-simpation indignigis lia aliĝo al la Habsburg-armeo, li obstinis; dum la kvar studjaroj de la tn. Akademio „Ludovika" li levis sin inter la unuajn, lernante plu dum deĵoro kiel juna oficiro. Baldaŭ en la Viena Armea Altlernejo – inter la nur kelkaj hungaroj – li ellernas la superajn militistajn sciojn por staboficiroj, kaj daŭrigante militsciencon ankaŭ kiel pedagogo kaj verkisto, lia kariero kulminas kiel – sola hungara – profesoro (de taktiko) en la menciita, plej alta oficirinstituto de Vieno. Tie profesoris ankaŭ *Teodor Körner,* kiu poste same fidele aliĝos al la laborista klaso, luktos same por batalpreta *Schutzbund* (ŝirma gvardio) de la Aŭstria Socialdemokrata Partio, kiel siaflanke agos Stromfeld, lia tiea kolego.

La unua mondmilito, pro la akraj imperiismaj interesoj, staris jam ĉe la horizonto –, tio estis bone observebla de Stromfeld, el la altaj sferoj, kie li turniĝis, Li tamen forte atendis paciĝon de la politikistoj, ke ili konsideros, kiaj puŝiĝegoj minacos siajn ŝtatojn en la milito – ja li antaŭvidis tion kun sia humanisma menso. Dubante pri venkebloj kontraŭ la Entento, pli forta laŭ militfortoj kaj industria fono, li sen militema pasio kaj glor-atendo ekmarŝis kun la armeo al Serbio.

Kiel stabestro en pluraj frontoj, li de proksime spertis suferojn de soldatoj kaj loĝantaro, naŭzaĵojn de la milito. Ĉar li konis lingvojn de diversnaciaj soldatoj, en notlibro kaj en leteroj al la amata edzino li notis kun komprenemo iliajn eliran volon, ne-batalemon. Superuloj laŭdege registris, per kiaj lerta inventemo kaj plena energio Stromfeld strebis provizi kaj ŝirmi la soldataron. Lia strategia kapablo rekoniĝis pleje ĉe egaj malvenkoj de la ĉefkomando – ne maloftaj dum fina agonio de la „centraj potencoj" – kiam li evakuis kaj savis multmilojn. „Unu el la plej faksciaj kaj talentaj oficiroj de la Monarkio", tiel li estis karakterizita, kiu senpacience atendis finon de la sangoverŝado.

Generalo de la revolucio

Apud la Ruslanda fronto Stromfeld kun simpatio perceptis la novajn fenomenojn post la renverso de la carismo; lia distanco disde la enradikiĝinta oficira idearo akre pligrandiĝis, kiam fine de la milito li trovis sin en la kirliĝo de la Budapeŝtaj revoluciaj moviĝoj. Eksigante ĉiujn militistajn altrangulojn, la nova registaro sole lin igas resti en la militservon: ĉefkomandanto (rektoro) de la „Ludovika" oficir-altlernejo, ŝtatsekretario, do la plej altaj komisioj por la plej aŭtoritathava, demokrate fidinda militscienculo. Klopodoj de reakciaj oficiroj, gajni lin por siaj komplotaj rondoj, tute fiaskis. Baldaŭ la Socialdemokrata Partio ricevis lian emfazitan vorton: *li plene aliĝas al la laboristoj!*

Kiel jam menciite, najbaraj ŝtatoj ekmilitis la novan Hungarion, kaj Stromfeld senhezite akceptis egan respondecon, la postenon de stabestro en la hungara Ruĝa Armeo. Dum krizaj tagoj li tre rapide reorganizis la armeon, kiun la partio kompletigis haste per tutaj divizioj de *laboristo-volontuloj,* varbitaj en la fabrikoj. La naskiĝinta popolarmeo sukcese plenumis la militplanojn de Stromfeld, kiu jam forte konvinkiĝis, ke nur la revolucia potenco de

La generalo inter ruĝarmeanoj

En la ĉefkvartiro de la Ruĝarmeo, kun la ĉefkomandanto, V. Böhm

la proletaro povas savi la nacion el la minaco. La militoperaciojn direktis mem Stromfeld el la ĉefkvartiro; estis triumfa rezulto la liberiĝo de gravaj urboj kaj teritorioj, kion slovakoj kaj hungaroj amase akceptis kun ĝojo. En junio la orienta parto de Slovakio proklamis la *Slovakan Konsilio-respublikon,* kiu liberiĝis de la francoj direktita burĝa ĉeĥa armeo. Pluaj, strategie esperplenaj manovro-planoj disvolviĝis jam por batal-senkapabligi la malamikojn, sekurigi la staton de la Konsilio-respubliko sur la Eŭropa mapo, kiam la Entento, mem *Clémenceau* per ruzaj promesoj atingis la batalhalton inter la militantoj. La venka armeo konfuziĝis, aliflanke spite de la batalhalto, la malamika armeo antaŭeniris, nekontraŭeble almarŝis al la ĉefurbo. Fine de aŭgusto la lando estis okupita . . .

En la proleta movado

La kontraŭrevolucia Horthy-regimo – post kiam gi ricevis eblecon regadi – kondamnis tribunale la armeestron, kiu estis defendinta la patrion tiom talente, sed nun neniel senkulpigis sin pro sia amika sinteno al la „krima komunista regimo". En la malliberejo Stromfeld memvole laboris kiel lignajisto, kaj inter la viktimoj de la orgojla reakcio plifirmiĝis lia socialista konduto. La restinta respekto al la eks-generalo helpis al li studi la marksismon, la okazintajojn de liaj militoj. Reiri en sia vojo neniel li volis: post la liberiĝo el la prizono li vivtenis sin en fabriko, sed firme rifuzis logajn invitojn de aristokratoj, iĝi arme-komandanto favore la tronon reokupi deziranta eksreĝo Karlo la 4a.

La Socialdemokrata Partio igis lin multmaniere agadi en la movado; Stromfeld publikis multajn artikolojn, organizis kulturajn, klerigajn programojn, pli kaj pli eniĝis ankaŭ en la partiajn internajn disputojn pri la politika linio. En tio ja estis multe kritikendaj el proleta vidpunkto. La riproĉojn kontraŭ la partia gvidantaro Stromfeld plurfoje emfazis publike, ankaŭ dum partia kongreso, kiel delegito de opoziciaj maldekstruloj. Klare vidante la politikan misvojon de la oportunismo en la socialdemokratio, li alproksimiĝis idee al la Leninaj pensoj (eksgeneralo Teodor Körner skribis tiutempe: „mi estas demokrata bolŝeviko"), kaj en Vieno, ĉe la CK de la Hungarlanda Partio de Komunistoj, Stromfeld iĝis ties membro.

Multe estimata kaj ŝatata, Stromfeld estis ĉien invitata, kaj la invitojn li akceptis kun vera homamo kaj fratemo kune kun sia same pensanta edzino. La Naturamikoj – inter ili ankaŭ nia ĵus forpasinta redakciano, *d-ro Lesznai* – dum ekskursoj politikis, la Infanamika Asocio Laborista kaj la Kontraŭalkohola Asocio Laborista en siaj kunvenoj same faris, kaj ĉie ĉi Stromfeld (cetere vera amanto de la naturpejzaĝoj) diskutis, babilis aŭ prelegis al la kamaradoj, kiuj elektis lin al gvidfunkcioj.

Pere de la sindikata grupo de oficistoj, en kiu partoprenis multaj esperantistoj, inter ili kompartianoj, Stromfeld aliĝis al la *laborista Esperanto-movado;* en 1927 lin elektis prezidanto grupo de HESL. Ties anoj estis ankaŭ Fr. *Szilágyi,* J. *Tomán* vortaristo, L. *Halka* redakciano de Literatura Mondo; la internaciaj rilatoj estis lerte utiligitaj por propagandi samtempe ambaŭ movadojn. Kompreneble la granda aŭtoritato de Stromfeld helpis popularigi Esperanton; li mem agitis por ĝin disvastigi, ni scias pri lia propagandcela prelego antaŭ granda publiko de sindikato.

La altirforton de nia movado utiligis aliflanke Stromfeld. Kiel komisiita estro li organizis, en kadro de la SDP, tn. *R-gvardion,* kiun li soldatmaniere trejnis dum montaraj ekskursoj, kaj varbis al ĝi multajn el la grupoj de HESL. Denove li havis eblecon utiligi la fakscion. La specifajn spertojn li priparolis plurfoje en Vieno kun Teodor Körner pri la tiea Schutzbund, kiu estis same sirmcela militorganizaĵo de la laborista klaso. „Kontraŭbatali – okaze – la *venontan mondmiliton!*" – skribis Stromfeld en lia lasta verko, konsekvence al la sindevigo: agi utile por la socio, por ties progresema, revolucion portanta parto. Lia multon laboranta koro abrupte haltis en oktobro 1927. Dekmiloj da laboristoj ĉirkaŭis la tombon de sia generalo fidela, homo vera.

Ervin *Fenyvesi*

EN LA METIEJO DE LA MODERNA DANCARTO



Maria Bretus kaj Imre Eck en la „Mirinda mandareno" de Béla Bartók

Intervjuo kun Sándor Tóth, direktoro de la Baleto de Pécs

Estas neforgesebla travivaĵo el miaj lernojaroj baletvespero en Pécs. Mi spektis *Mirindan mandarenon* de Béla *Bartók* en la prezento de Imre *Eck,* Sándor *Tóth* kaj Mária *Bretus.* Mi rememoras la mutan silenton, kiu dum momentoj regis la spektejon post la mallevo de la kurteno antaŭ ol estis eksonanta la entuziasma aplaŭdo. Kia estis tiu prezentado? Sugestia, arte perfekta kaj pensiga. La spektanto alkutimiĝinta al la klasika baleto vidis ion tute novan: modernan baleton de Eŭropa nivelo.

Tiam ankoraŭ la ensemblo estis nova, ĝi fondiĝis en 1960. Sed ĝia arta laboro tute ne montris la malcertecon de la komencantoj – rigardante la prezentadojn, la publiko povis konstati efektiviĝon de logike trapensita koncepto.

Nun, kiam mi vizitas en la Nacia Teatro de Pécs direktoron Sándor *Tóth,* gvidanton de la jam mondfama balet-ensemblo, mi unue interesiĝas pri tio ĉi:

– Kun kiaj artaj celoj ekfunkciis la Baleto de Pécs, kaj ĉu ŝanĝiĝis la artimagoj dum la pasintaj jaroj?

– En la komenco de la sesdekaj jaroj ni estis eksperimentanta ensemblo. Plejparton de nia agado ni dediĉis al la verkoj de la samtempaj hungaraj komponistoj, kaj klopodis krei tian metiejon por la koreografiistoj, kie la artistoj senteme reagantaj al sociaj problemoj povas politike kaj humanisme esprimi sian opinion pri la socio, en kiu ni vivas. Tiu ĉi programo esence ne ŝanĝiĝis. Eble la eksperimentado iĝis iom mapli grava. Elformiĝis nia propra baleta stilo. Ŝajnas al mi, ke se fakulo spektas parton el kiu ajn nia programo, li tuj rekonas: Jes, ili estas tiuj el Pécs! Samtempe ni ĉiam serĉas novajn pensojn, novajn formojn.

– Aparteni al la Baleto de Pécs signifas rangon. La plej eminentaj fondintaj membroj ankoraŭ nun estas en la ensemblo, ilia nomo estas legebla sur la afiŝoj. Sed krom ili jaro post jaro ekaperas ankaŭ novaj talentoj en Pécs. Kiel vi povas ekvilibrigi la konstantecon kaj la renoviĝon?

– Relative malgranda ensemblo kun 35 membroj, kiel la nia, devas elformi la stabon de la dancistoj laŭ tre rigoraj artaj pretendoj. Ni ne povas „alimenti" superfluajn membrojn. La kontraktoj validas por unu jaro, cê solistoj por du jaroj, kaj poste ili estas renovigitaj. La fondintaj membroj parte eĉ nun plenumas tre gravajn dancrolojn, parte koreografias kaj instruas. Imre *Eck* intertempe fariĝis arta gvidanto de la ensemblo, mi laboras ekde 1969 kiel direktoro kaj koreografiisto. Mária *Bretus,* Dóra *Uhrik,* Gabriella *Stimácz* kaj János *Hetényi* ankoraŭ hodiaŭ estas niaj gvidantaj solistoj. Antaŭ kvar jaroj malfermiĝis en Pécs la Dancartista Fakmezlernejo, kiu estis fondita tie ĉi ĝuste pro tio, ĉar en Pécs vivas kaj laboras nia ensemblo, kiu povas doni al la gelernantoj konvenan fakan klerigon. El la novaj junaj talentoj mi devas mencii la nomojn de Gizella *Zarnóczai,* Gyöngyi *Tamás,* Magdolna *Paronai,* Pál *Solymos,* Ferenc *Kuli,* László *Körmendy* kaj Pál *Lovass.*

Krom Imre *Eck* kaj mi laŭregule laboras ĉe ni gast-koreografiistoj. Ekzemple Alberto *Alonso* venis el Kubo, Konrad *Dziewicki* el Pollando. Gastis ĉe ni Gyula *Harangozó* – kiu bedaŭrinde jam forpasis – dum kies ĉeesto ni prezentis nian unuan hungaran baleton. En la sekvonta tempo ni atendas baletdirektoron de la Hungara Ŝtata Operdomo, László *Seregi.* Nia edukito estas la juna István *Majoros,* kiun atendas gravaj koreografiaj taskoj.

– La koreografio kaj la danca formo-lingvo – mi pensas – estas strikte kunligitaj. En kio la mov-tekniko de viaj dancistoj diferencas de tiu, kiun la kultivado de la klasika baleto bezonas?

– La Baleto de Pécs konsistas el dancistaj adeptoj de la klasika skolo. Mi opinias, ke la perfekta alproprigo de la klasika skolo certigas al la dancistoj tiatipan mov-inteligentecon, sur kiu povas baziĝi poste aliaj stiloj. Tamen ni prezentas nek klasikan, nek romantikan baleton. Ĉe ni por la koreografiisto la formon ĉiam difinas la intelekta enhavo de la surscenaĵo. Tiu fakto signifas samtempe ankaŭ tion, ke la novajn mov-formojn ni elformas dum la provoj de la nova prezentado, kiam la dancisto luktas kun la materialo.

– Ekde 1960 la ensemblo ĉiujare prezentas la novan tutvesperan baleton sub la resuma titolo: „Baleto" plus la jaro. Ekzemple, la plej lasta estas Baleto 1977. Kian signifon havas tiu signado?

– Kiam ni diras ekzemple *Baleto 1977,* tio signifas nian plej novan premieron, programon, kiu en la ĵusa momento estas por la ensemblo la plej grava. Do, la *Baleto 1977* surscenigis komponaĵojn de samtempaj kom-

Ludmila Leontieva, dancpedagogino de Kamero-Baleto de Leningrad, instruas klasikan baleton en Pécs.

Edit Handel kaj Mihály Molnár en „Reĝido, skulptita el ligno" de Béla Bartók

ponistoj. Tie ni prezentis ilian eminentan goupon konsistantan el László *Sáry*, Sándor *Szokolay*, Emil *Petrovics*, György *Kurtág* kaj András *Szöllősy*. Ilia prezentiĝo en Pécs signifas samtempe muzikan eventon de tutlanda graveco. Preskaŭ ĉiuj gravaj hungaraj komponistoj jam komponis muzikon por la Baleto de Pécs. Sed ekzemploj pruvas ankaŭ tion, ke ni adaptis al baleto muzikon komponitan por alia celo. Do, reirante al la demando, niaj plej bone sukcesintaj baletoj kreas repertuaron konsistantan el 30 surscenaĵoj. Nun ekzemple ni iras gastludi al Budapeŝto kun *Baleto 1976*, do, kun *Rekviemo* de Verdi. Sed nia nova programo en la kuranta jaro estas spektebla nur en Pécs. Per tio ni honorigas la urbon, kiu garantias al ni trankvilan kreadon, dinamikan progreson.

– Kiuj estas la plej novaj planoj de la ensemblo?

– Ni preparas novan baletvesperon; la VI-an kaj la VII-an simfoniojn de Beethoven surscenigas Imre *Eck*. En la nuna jaro Hungario pliriĉiĝas je nova aranĝo, la *Somero en Pécs*, al kiu nia ensemblo esence kontribuas. Ĝis nun sur la scenejoj de diversaj someraj artaranĝaĵoj en nia lando la dancarto ne ricevis konvenan forumon. Tion ni celas nun krei. Precipe ni intencas prezenti oratoriajn baletojn. La urbo Pécs havas bonegan simfonian orkestron, elstarajn ĥorojn kaj operon. Nia kunordigata laboro do plivigligos ankaŭ la muzikan vivon. Entuziasmigas nin tiu fortoprova tasko. Ĝis somero ni koncentras nin al la teknika progreso. Nia soveta baletmajstrino, Ludmila Viktorovna *Leontieva* laboras ĉe ni unu jaron. Ŝia ĉeesto valoras same, kvazaŭ ni sendus ĉiujn niajn dancistojn por unu jaro al Leningrado. La aŭtuna sezono pasos „sub la signo" de la gast-koreografiistoj.

– La Baleto de Pécs multe turneas* eksterlande. Kiajn planojn vi havas?

– Vere, ni tre multe prezentiĝas en diversaj landoj. En la pasinta jaro ni estis en Sovetio, Kubo kaj Jugoslavio. En 1978 – pro la menciitaj gravaj taskoj – ni restos hejme. Sed poste ni volonte akceptos invitojn de ĉie ajn, kie oni interesiĝas pri nia arto.

Éva *Tófalvi*

**turneo:* vojaĝo de artista trupo por prezenti spektaklojn diversloke.

Sceno en Suito h-minora de Bach el „Baleto 1976"

NUNTEMPA BULGARA POEZIO

La fonto de la nuntempa bulgara poezio estas la riĉa popola kreado. Necesis multaj jaroj por evoluado kaj disfloro de la moderna bulgara poezio. Nun ĝi estas vasta realisma spegulo de la vivo en la socialisma Bulgario. En ĝia fokuso estas la nova homo kaj lia nova vivo.

Multaj estas la bulgaraj poetoj, kiuj vivas kaj kreas nun en Bulgario. Ĉiu el ili havas originalan stilon kaj propran voĉon. Poetoj kiel *Bagrjana,* Blaga *Dimitrova,* Pavel *Matev* estas teneraj, emociaj, aliaj kiel L. *Levĉev, Ĝagarov* estas logikaj, raciaj. Iuj preferas filozofiajn konstatojn en la poezio, aliaj delikate penetras en la intiman homan vivon, sed per sia kreado ĉiuj spontane reeĥas al la dinamika, multfaceta nuntempa vivo en Bulgario.

Georgi *Mihalkov*

Nia revuo deziras omaĝi per tiu ĉi paĝo al la kulturo de la ĉijara kongreslando.



Pavel Matev

NIA GENERACIO

Nin pridonacas ĉiu temp' per io,
en kio estas heroaĵo, revoj.
Ricevis mia kruda generacio
severajn trajtojn de la karaktero.

En kiu hor'gîn malamik' ne gvatis?
En kiu hor' ĝi vivis en trankvilo?
Ĝi pri bagatelaĵoj ne malpacis,
nenion gajnis sen batal', armilo.

Ja kie ĝi metis tendojn siajn,
en marŝ' ĝin ĉiam la aŭror' salutis.
Survoje ĝi postlasis pezajn signojn:
la tomboj de la pereintoj mutis!

Eĉ nun ĝi portas faltojn, maltrankvilojn.
Per faroj niaj tagoj nun plenegas.
Decide venkas gravajn malfacilojn,
ĝi sian sorton al neniu cedas.

Ne grumblas ĝi pro peza ŝarĝo sia,
ne volas brili antaŭ la ceteraj . . .
Ricevis tiu ĉi generacio
karakterizajn trajtojn plej severajn.

Tradukis: Asen Grigorov

Elisaveta Bagrjane

MORGAŬA TAGO

Pri vi aŭguras nek la intelekto, nek la koro,
por ni vi estas ĉiam vualita vivmister'.
Ho, diru: kiam komenciĝas vi, en kiu horo?
Kaj ĉu denove iam vi aperos sur la ter'?

Homaro tuta staras kun rigard' al vi fiksita,
petante aŭ minacproteste kontraŭ la destin'.
De vi atendas malsatanto esti satigita,
malfeliĉul' de vi atendas feliĉigi sin . . .

Ĉu reaperos vi senŝtorme, kiel la aŭroro,
aŭ vi ektondros kiel bombo super tuta mond'?
Ne scias ni, sed nur atendas kun esper' en koro, –
morgaŭa tago, – ĉiam nova, juna vivoond'.

El la bulgara: Simeon M. Simeonov

Damjan Damjanov

NOKTA DEĴORO

Ĉiutage, en la frumateno
maldorminte super versoj miaj
mi ekvidas en la malproksimo
lumi en flamegoj incendiaj
la fenestrojn de giganta domo.
Lampoj? Sunaper'? Aŭ reflektiĝas
en la vitroj brulŝtiparo stranga?
Dum cerbumas mi, heliĝas
la mallumo blue, rozkolore.
Mi komprenas: lumis supertere
tiu ĉi uzino noktdeĵore.

Lumis la martel', tornilo, teksostablo
per navetoj pezaj siaj lumis.
Lumis manoj kaj okuloj homaj.
Tutan nokton. Dum mallumo pluvis.
Tutan nokton. Dum dormadis ĉio.
Tutan nokton. Dum en la mallumo
iu amis, kaj alia ploris,
kaj mi mem, de l' seĝ'ne leviĝinte,
ankaŭ mi deĵoris kaj laboris.
Teksis tekstojn, forĝis vortojn miajn . . .
Frumatene sunleviĝo lumas,
sunaper', vivanta, granda, vitra,
kiel fajro, brulŝtipar' heliĝas.
Lumas ŝvite, en maldorm', soife,
kaj el tiu sunaper' – tagiĝas.

Tradukis: Asen Grigorov

Vâtjo Rakovski

MALPROKSIME

Vespere, kiam la radio ludas
kaj vi aŭskultas ĝian melodion,
mi iĝas sono de muziko ĝia,
al vi por povi
diri ion.

Se pluvas, mi fariĝas guto blanka,
al vi mi proksimiĝas malrapide
kaj sur fenestro via mi ekfluas
por povi
vin ekvidi.

Se suno lumas, iĝas mi radio,
sur via vitro flamas sinforgese,
eniras ŝtele-ŝtele vian ĉambron
por povi
vin karesi.

Nur tiel povas mi kun vi paroli,
nur tiel povas vidi vin anime,
karesi tiel vin, ĉar vi, ho kara,
troviĝas
malproksime.

El la bulgara: Asen Grigorov

La bulgara – hungara amikeco ne estas de hieraŭ

En novembro 1849 en urbon Ŝumen (Nordorienta Bulgario) venas Lajos *Kossuth* kun sia taĉmento de 5 mil hungaraj soldatoj kaj oficiroj kaj polaj volontuloj.

La enmigrintoj konservas sian hierarkion, eĉ sian monsistemon ili enkondukas en la urban bazaron. Ŝajnas, ke Kossuth estis farinta monerojn ankaŭ en Ŝumen. Baldaŭ venis ankaŭ la familianoj de multaj enmigrintoj. Iom post iom ĉiu komencis okupiĝi pri sia laboro kaj metio.

La aspekto de la hungaroj estas eleganta. Ili vestas sin en blankaj lanŝtofaj uniformoj, portas poŝhorloĝojn kaj laŭmodain ŝuojn. Ili scipovas prepari bongustan ŝinkon kaj kolbasojn. De ie ili prenas specialajn kandelojn por lumigado kaj komencas konstrui al si ĉarojn kun feraj radringoj. Ili mem konstruas bol-kaldronegon kaj baldaŭ komencas produkti nekonatan amaran trinkaĵon – bieron. Proksime al la urbo ili aĉetas teron kaj aranĝas tiel nomatan „Hungaran bienon", en kiu ili okupiĝas precipe pri brutbredado.

Iuj enmigrintoj fariĝas instruistoj. En la tiamaj lernejoj ili enkondukas novajn lernobjektojn kaj aplikas modernajn edukmetodojn. Per sia liberama spirito ili influas la lernantojn, kaj tiel same ties gepatrojn. La hungaroj estas ne nur entreprenemaj en sia laboro. Ili estas ankaŭ homoj kun impeta kaj senbrida temperamento. Ili vivas libere kaj senzorge, ne konsiderante la otomanojn. Ne faras escepton ankaŭ Kossuth mem. Oni memoras sekvan kuriozan okazaĵon: Venis el Konstantinopolo komisiono por kontroli kiel estas loĝigitaj la hungaraj enmigrintoj. Kossuth donis por la okazo specialan ordonon. Eniras la komisiono en la korton kaj kion vidi! – de la balkono pendas senhaŭtigita porkego! Ektusetis la membroj de la komisiono, ekrigardis unu la alian . . . En ĉi momento Kossuth stariĝas antaŭ ili kaj demandas:

– Nu, sinjoroj? . . .

Ĝenerale, kune kun la hungaroj en Ŝumen venas novaj kaj nekutimaj aĵoj. En 1850 la enmigrintoj preparas kaj surscenigas la teatraĵon „La fuĝanto" de Szigligeti. Unu el la bulgaroj, kiu estas plej intima al ili, kaj eĉ tradukas por Kossuth la turkan gazetaron, estas la instruisto Sava *Dobroplodni*. Sub influo de la teatra prezentado de la enmigrintoj, li projektas la komedion *„Mihal Miŝkoed"* (Mihal la Musmanĝanto). La 16-an de aŭgusto 1856, kun la helpo kaj subteno de la plej inspiritaj intelektuloj, oni efektivigas unuan bulgaran teatran spektaklon. Tiu fakto pravigas, ke oni konsideru Ŝumen lulilo de la bulgara teatro.

En 1851 la juna 25-jara hungaro Mihály *Sáfrán* kreas orkestron. Komence la orkestro konsistas nur el hungaroj, sed iom post iom ĝi pligrandiĝas ĝis 9 personoj, inter kiuj estas ankaŭ bulgaroj. Post repatriiĝo de la hungaroj, la orkestro daŭrigas sian ekzistadon. Daŭriganto de la afero de Sáfrán fariĝas Dobri *Vojnikov*. Pli poste la orkestron akceptas Atanas *Stojanov*, de kies genealogia nomaro devenas la eminentaj komponistoj kaj „popolaj artistoj" Andrej *Stojanov* kaj Veselin *Stojanov*. Tiamaniere en Ŝumen sankciiĝas muzikaj tradicioj kaj ĝi ĝis nun portas la gloron de unu el la ĉefaj muzikaj urboj en Bulgario. Ŝumen donis al nia krea kaj plenuma artoj multe da elstaraj agantoj.

Kiel simbolon de la bulgara-hungara amikeco en la centro de Ŝumen, sur strato „Car Osvoboditel" n-ro 26 oni povas vidi blankan marmoran platon kun ora surskribo:

„En ĉi tiu domo vivis kiel enmigrinto
de 21.11.1849 ĝis 16.02.1850
L A J O S K O S U T
gvidanto de la hungara demokratia revolucio
de la jaro 1848."

Stefan N. *Georgiev*

Tegitaj kaj subĉielaj basenoj en Zalakaros

Enirejo de la moderna kurac-hotelo Thermal en Hévíz

TERMALTURISMO EN HUNGARIO

En Hungario krom la multaj naturaj fontoj proksimume 350 boritaj putoj elverŝas termal- kaj kuracakvon. La sciencaj indikoj atestas: en la mondo oni devas bori ĝenerale 40 metrojn, en Eŭropo 33 metrojn en la profundon por atingi 1 °C-an altiĝon de la temperaturo, en Hungario oni atingas tion per 18–20 metra borado. Ofte el 1000–1500-metraj boraĵoj venas jam 90 °C-a aŭ pli varma akvo.

En Hungario nuntempe 8 kuraclokoj, 17 kuracbanejoj kaj 72 refreŝigejoj akceptas gastojn, kiuj sopiras resaniĝi, refreŝiĝi per termalakvoj.

La komenco de la turismo

En Eŭropo troviĝis kelkaj kuracbanlokoj, kies mondfamon fondis la romianoj, ekz. *Aachen, Aix-les-Bain* kaj, plej grava por hungaroj: *Aquincum* (ĉe la nordokcidenta rando de la hungara ĉefurbo). En tiun iaman romian urbeton vojaĝis multaj malsanuloj el ankaŭ malproksimaj lokoj. Hungario tre riĉas je kuracaj termalakvoj, kio ebligas signife evoluigi la fremdultrafikon. Inter tiuj famaj kuracakvoj tiuj de *Budapeŝto, Hévíz, Harkány* kaj *Hajduszoboszló* estas ankaŭ internacie konkurkapablaj.

La vera fremdultrafiko al hungaraj kuracbanejoj komenciĝis ĉe la fino de la pasinta jarcento. Inter la du mondmilitoj ĝi jam estis tre signifa, tamen ankoraŭ postrestis al tiu, kiu sekvis post la dua mondmilito. Post la milito okazis konsiderinda ŝanĝo en la hungara fremdultrafiko. La Konstitucio de la Hungara Popolrespubliko leĝe garantias la rajton de la laboruloj al salajrata ferio kaj ripozo. Flanke de la ŝtato okazis grandaj fortostreĉoj por realigi tiun rajton. Estiĝis pli kaj pli da feriejoj kaj ripozejoj por la servo de la sanprotektado kaj ripozo. Neatendite altiĝis ankaŭ la nombro de la eksterlandaj turistoj, kies grava parto venas ĝuste por viziti kuracbanejojn.

Budapeŝto kiel urbo de banejoj

Dum la dumiljara historio de la hungara ĉefurbo la kuracfontoj havis ofte gravan rolon. Budapeŝto estas bela kaj interesa urbo, kiu disponas pri grandiozaj naturaj trezoroj. La diversaj termalfontoj, troviĝantaj en la ĉefurbo, produktas tiel grandan kvanton da kuracakvo, ke tiurilate Budapeŝto estas la plej riĉa ĉefurbo de la mondo. Tre gravas ke la Budapeŝtaj kuracbanejoj povas akcepti gastojn en ĉiuj sezonoj. Ilia akvo estas konvena precipe por tiuj, kiuj suferas de diversaj movorganaj malsanoj.

La evoluigo de la Budapeŝtaj kuracbanejoj ankaŭ nun daŭras, kaj la konsilantaro de la ĉefurbo jam decidis pri fondo de centro „Budapeŝto-banurbo".

Slim-kuracado en la budapeŝta kuracbanejo Lukács

Volonte vizitadas la malsanuloj eĉ dum la vintro la varmakvajn basenojn subĉielajn en Hajdúszoboszló





La kuracefika akvo kaj la balastoj bonrezulte rektigas la spinon en la banejo Harkány

Nuntempa bankuracado

La bankuracado kaj la sanprotektado kunligita kun ripozo, mondskale malfermis novajn perspektivojn al la turismo. La konformaj klimataj eblaĵoj kaj la mineralakvo elverŝiĝanta el la tero, en si mem ankoraŭ ne prezentas altirforton por la fremdultrafiko. La kuraclokan karakteron difinas multe pli la banbasenoj, la suplementaj kaj bone ekipitaj institucioj, kiel ankaŭ la medicina prozorgado kaj aliaj sanitaraj cirkonstajcoj.

Unu el la plej idealaj, tradiciaj kuracterenoj. *Hévíz* situas apud Balatono. La lago de Hévíz mem estas unika en Eŭropo, simila troveblas nur en Nov-Zelando. La surfaco de la lago ampleksas 47 500 m^2, la akvoproduktado de la fontoj estas ĉiuminute 36 mil litroj, sekve dum 48 horoj ŝanĝiĝas la tuta akvokvanto de la lago. La publiko povas sin bani ĉi tie en ĉiuj sezonoj: la temperaturo de la akvo somere estas 33–35 °C, vintre 22 °C. Efikas ne nur ĝia radiumo kaj sulfuro, sed ankaŭ la radioaktiva kuracŝlimo, kiu dike kovras la fundon de la lago. Ĉio ĉi estas rekonitaj kuracfaktoroj kontraŭ reŭmatismaj malsanoj.

En Hévíz atendas la gastojn pluraj hoteloj, inter kiuj estas la plej nova kaj moderna la hotelo „Termal".

Ĉe esplorborado por petrolo oni trovis termalakvon en la Transdanubia vilaĝo *Zalakaros,* situanta proksime al Balatono. Ĉi tie la temperaturo de la akvo estas 96 °C. Ĝi efikas precipe ĉe reŭmatismo, kaj postkuracado de akcident-difektitoj. Laŭ la spertoj ĝi apartenas al tiuj raraj kuracakvoj, kiuj estas bone aplikeblaj ankaŭ por sanigi kelkajn haŭt-malsanojn.

*

La hungara banafero travivis skuegojn de du mondmilitojn. La militoj neniigis multajn valoraĵojn de la ĝis tiam elformiĝinta bankulturo. Tamen, rezulte de la novaj fortostreĉoj, la hungara banafero laŭgrade resaniĝis el la gravaj vundoj kaj perdoj, kaŭzitaj de la militoj. La sekvaj jaroj promesas pluan evoluon, precipe konstantan plibonigadon de la suplementaj servoj.

István *László*

Barna Radványi

ŜTONTABULO

Zero Defekt, juna, sed esperplena profesoro de arkeologio, estis tridekjara, kiam la fosilo elterigis ŝtontabulon kun kojnoskribo ĉe la faŭko de la groto en la valo Grosmuter. Li firme decidis ne trankviliĝi ĝis li deĉifros la sekreton de la literoj gravuritaj sur la ŝtono: la mesaĝon, kiun lasis al la posteularo nia praulo, vivinta antaŭ miljaroj. Li ĝojis pri tiu laboro, en kiu li povis enprofundiĝi, almenaŭ tiel li pli facile transsuperis la sortobaton okazintan en sia privata vivo. Nome ĝuste antaŭ kelkaj tagoj forlasis lin la edzino kun lia plej fidela disĉiplo, Danielo . . .

Deknaŭ jaroj forpasis, kiam Zero Defekt povis publikigi sian unuan sciencan studon pri la arkeologia trovaĵo en valo Grosmuter. Li pruvis per scienca precizeco, ke la ŝtontabulo devenas el plejstoceno, la teksto konsistas el 21 literoj kaj unu interpunkcia signo kaj vira mano gravuris ilin sur la ŝtono.

Ankoraŭ en la sama jaro aperis la disputstudo de Kraft van Dostig, holanda arkeologo en kiu li nerefuteble nuligis la tezojn de Zero Defekt (li nomis lin tutsimple idiota histriono), kaj li pruvis per scienca precizeco, ke la ŝtono estas el mioceno. Sur ĝi troviĝas 22 literoj kaj virina mano skribis ilin.

Ankaŭ sen tio Zero Defekt havis malfacilan jaron: lia dua edzino ĝuste tiam eskapis kun lia plej fidela disĉiplo, Valentino.

En la dudek naŭa jaro post la elterigo de la arkeologia trovaĵo en la valo Grosmuter, la gazetaro disvastigis la famon pri la scienca sensacio: profesoro Zero Defekt jam deĉifris tri literojn el la 21 kaj li konstatis sen ia dubo, ke la lasta interpunkcia signo estas krisigno.

Post kelkaj tagoj Kraft van Dostig komunikis en preskonferenco, ke li konas jam la sekreton de kvin literoj kaj li ĵure asertis, ke la lasta interpunkcia signo estas dupunkto. Ke tio estus krisigno, tion povas aserti nur tiaspeca, miopa kanguruo, kiel Zero Defekt, kiu estas framasono kaj malĉastigisto, li estas reserĉigita de la polico en Hongkongo pro monkontrabando kaj ekde multaj jaroj li ne pagas hundimposton.

Ĉijare okazis, ke por la elspezoj de la scienca esplorado li disipis sian tutan havaĵon, do Zero Defekt deviĝis vendi eĉ sian domon kaj li transloĝiĝis en la lignan kabanaĉon starigitan en la valo Grosmuter. Lia tria edzino pafis sin for de li, en la kaoso de la transloĝiĝo, kun lia plej fidela disĉiplo, Guido . . .

En la tridek naŭa jaro de la esplorlaboro, Zero Defekt deĉifris la sekreton de pliaj tri literoj.

Lia kontraŭulo Kraft van Dostig tuj komunikis, ke li konas jam naŭ literojn. Samtempe li komencis proceson kontraŭ Zero Defekt akuzante lin pri la sistema ŝtelado de liaj sciencaj rezultoj, kaj de la kokinoj de la indiĝena loĝantaro. Post kiam li trovis korupteblajn atestantojn, la tribunalo kondamnis Zeron al sepjara mallibero en fortikaĵa prizono. Lia plej malgranda nepino, kiu estis la sola apogo de la aĝulo, fuĝis guste la tagon de la juĝeldiro kun la plej fidela disĉiplo de la profesoro, kun Norberto . . .

La kvardek naŭa jaro estis plenplena de eventoj:

Kraft van Dostig „la altruista, grandanima laborulo de la scienco" (citaĵo el la funebra anoncilo), neatendite forpasis.

Zero Defekt sukcese deĉifris la dekan literon. Samtempe lia piedo paraliziĝis pro piko de venena muŝo, kaj la malsano ligis la kadukan profesoron al la ŝovveturileto. La lasta espero, Ĉiĉeria, la adoptita indiĝena knabino, ĝuste ĉijare forigis kun la plej fidela disĉiplo de la profesoro, kun Alfredo . . .

Precize en la kvindek naŭa jaro post la elterigo de la arkeologia trovaĵo en la valo Grosmuter, estis sukcese deĉifritaj ankaŭ la lastaj literoj. Zero Defekt volus famigi la grandan sensacion, sed neniu estis apud li. Lia sepdekjara flegistino, ĝuste tiun matenon forvaporiĝis kun la plej fidela disĉiplo de la profesoro, kun Viktoro . . .

Cetere la deĉifrita tuta frazo teksis jene:

Enirejo tra la alia pordo!

El la hungara:
D-ro Stefano *Nagy*

Kronado de Andreo la 1-a (Inicialo en la Ilustrita Kroniko)

★ ĈAPITROJ

Zoltán Halász

3. La firmiĝo

Luktantaj viroj sur kapitelo en la reĝa kapelo de Esztergom, konstruita inter 1180–1200

Post la ŝtaton fondinta reĝo, *Stefano* la 1-a, sekvis bataloj por la trono, ĉar lia filo *Imre* mortis jam pli frue (la poste sanktigita Imre populariĝis ankaŭ en Italio, latinigite kiel Emriko, Emeriko, Amerigo!). La internaj kolizioj ebligis al la germana imperiestro, *Henriko* la 3-a, surtronigi sian vasalon, kiun baldaŭ forpelis popola movado, direktiĝanta kontraŭ la fremduloj – sekve parte ankaŭ kontraŭ la eklezio. Helpe de tiu movado, *Andreo* la 1-a (1046–1060),

Kapo-relikvujo de Sankta Ladislao en urbo Győr

ido de la reĝa familio Arpad-a konkeris la tronon, kaj li rapide subpremis la lastajn ribelojn de la paganoj. Andreo kaj liaj posteuloj energie defendis la landon kontraŭ ripetiĝantaj agresoj de la germanaj armeoj, kaj sukcese gardis la sendependecon de la ŝtato ankaŭ disde la Bizanca imperio.

Fine de la 11-a jarcento la hungara feŭdisma reĝimo jam plene firmiĝis. Reĝo *Ladislao* la 1-a (1077–1095) per kruelaj leĝoj stabiligis la bazon de la feŭdismo: la *privatan posedaĵon*, kiu definitive venkis super la tradicia, pradevena sistemo de la komuna propraĵo de la gentoj. Grave kontribuis kompreneble la feŭdisma eklezio, kiu abunde ricevis da grandbienoj de la reĝoj. Ladislao etendis la landlimojn sude ĝis Dalmatio; ties urbojn konkeris jam lia posteulo, *Kolomano* (1095–1116).

Dum la 12-a jarcento Hungario jam alproksimiĝis al la ekonomia kaj kultura nivelo de la feŭdisma Okcident-Eŭropo. La terkultivado forte plivastiĝis, la loĝantaro kreskis (ankaŭ pro enmigrado de italoj, francoj, valonoj, rumanoj, saksoj k.a.), kaj kreiĝis jam urboj (Esztergom, Székesfehérvár, Pest) kun komercistoj kaj metiistoj. Ankaŭ inter la kampuloj specialigis sin metiistoj por plenumi la bezonojn precipe de feŭduloj. Ni menciu la vilaĝon *Kócs* (kóĉ), kie oni fabrikis, inventis „modernan" risorthavan kaleŝon; ties nomo troviĝas en G. *Kutsche*, A. *Cootch*, F. *cocher*, k.a., ankaŭ en E. *koĉero*.

Apud klostroj fondiĝis lernejoj por eduki diakonojn, pastrojn; studentoj estis senditaj al la unuaj Eŭropaj universitatoj, al Bologna, Parizo. La reĝa administrado skribis latinlingve la dokumentojn, la diplomojn pri bien-donacoj, samtiel la teologoj kaj kronikistoj siajn verkojn; tamen la scipovo de lego atingis nur malvastan rondon. La romanika arkitekturo de gravaj preĝejoj montris jam signojn de la frua gotiko (Zsámbék, Ják).

La daŭraj tron-disputoj igis la reĝojn gardi la fidelecon de la potencaj altranguloj kaj ĉefpastroj pere de grandaj donacoj. Ili ricevis pli kaj pli da feŭdaj bienoj, ofte eĉ tutajn reĝajn departementojn kune kun la tie vivantaj reĝaj vasaloj. De tiam la etbienuloj, servantaj pli frue kiel reĝa militistaro (*„servantoj"*), estis devigitaj ekservi – ĝenerale sub pli pezaj kondiĉoj – en privataj trupoj de la feŭdaj grandsinjoroj. Ilia forte kreskanta potenco akre minacis subpremi ankaŭ la ceterajn etbienulojn, igi ilin vasaloj. Des pli timigis tiu procezo la kampularon, de kiu la ekleziaj grandbienuloj ekpostulis jam la dekonaĵon pagi per mono.

Andreo la 2-a (1204–1235) pro la ega malkresko de sia propra bieno-teritorio perdis jam tro multe da enspezoj, kaj tial klopodis kompensi sian kason, t.e. la ŝtatkason, per daŭra malplivalorigo de la arĝentaj moneroj, per novaj impostoj, luigo de reĝaj privilegioj, kiuj tamen nur plialtigis la ĝeneralan malkontenton. Kreiĝis vasta movado de la etbienuloj, „servantoj", kiu – kun opoziciaj granduloj kaj eklezianoj – en 1222

de la feŭdismo kaj la komencoj de la dispartiĝo



Kronado de Kolomano (Miniaturo en la Ilustrita Kroniko)
Unua paĝo de *Gesta Hungarorum*
verko de magistro P. (Anonymus), ĉirkaŭ 1200

trudis al la reĝo eldoni la *„Oran Buleon"*. Tiu leĝo (nomita laŭ la ora sigelo) proklamis ĉiujn privilegojn de la grandsinjoroj de nun validaj ankaŭ por la „servantoj": ne-impostado, libera testamentado pri siaj havaĵoj, juĝo en grava proceso nur far la reĝo aŭ lia anstataŭanto, devo militi nur okaze de malamika agreso, k.s. La reĝo devigis sin firmigi la valoron de la mono, kaj ne donaci tutajn departementojn; li permesis pagi la dekonaĵon per naturaĵoj anstataŭ mono. La buleo deklaris, ke okaze de ĝia malobservo far la reĝo, la granduloj rajtas libere kontraŭstari al la reĝaj ordonoj (ius resistendi).

Ĉi tiuj privilegioj iĝis poste la kerno de la ĝeneralaj *nobelaj* rajtoj, privilegioj. Tamen eĉ la Ora Buleo ne malhelpis, ke la grandbienuloj (baronoj) ankaŭ plu pligrandigu siajn bienegojn kaj potencon, eĉ kiel provincestroj, praktike dispartigu la landon inter si.

Antaŭa kaj dorsa flanko de la Ora Buleo

Tomba krono de *Adalberto* la 3-a



PRI HUNGARIO EN FORA LANDO

En Uzbekistano (U.S.S.R.) la Uzbeka Amikeca Societo de eksterlandaj Kulturaj Interrilatoj aperigas belaspektan monatan revuon kun multaj koloraj bildoj, kies titolo estas: „Nuntempa Soveta Uzbekistano". La revuo aperas en la lingvoj rusa, angla franca, hispana, araba, persa kaj urdua. (Bedaŭrinde esperantlingve ne).

Per la amika helpo de inĝ. Petro Poliŝĉuk, jam de multaj jaroj mi regule ricevas la numerojn de tiu sciencpopulariga revuo. Pro manko de spaco mi ne povas multe konigi el la vere interesaj artikoloj, tamen kun fiero mi legis ofte pri nia lando:

– ... El diversaj universitatoj kaj altlernejoj de Sovetunio estis invititaj al Taŝkento 180 diverslandaj studentoj, kiuj lernas en Sovetunio, por ekkoni la vivon kaj evoluon de la uzbeka popolo. Ili vojaĝis plurcent kilometrojn en la lando, fine uzbeka ĵurnalisto elektis el ili ses gestudentojn por ekscii iliajn impresojn. La ses gejunuloj estis el Peruo, Hungario, Bangladeŝo, Burundio, Pollando kaj Tunisio. La hungaro estis József *Biró*, duajara studento de la Topografia Instituto en Leningrado. Li diris:

– Uzbekistano estas admirinda lando, en kiu la tero konigas al ni la „primaveron". Por ni la agrabla „somero" montras, ke la malnova senkultura regiono, subpremita de iama cara regado, denove reviviĝis kaj fiere elkreskas al moderna socialisma respubliko kun prospera fabrikindustrio ...

Ankaŭ en la sama numero (1977/12) estas legebla: *La „Ikarusoj" sur la stratoj de la ĉefurbo de Uzbekistano.*

– La komfortaj aŭtobusoj konstruitaj en Hungario ĝuas grandan popularecon inter la loĝantoj de Taŝkento. La duono de la 1200 aŭtobusoj, kiuj certigas la ĉiutagajn transportojn de la publiko estas la Ikarusoj, kiuj donas grandan helpon al la urba trafiko. La aŭtobusoj en Taŝkento ĉiutage kunportas pli ol milionon da pasaĝeroj ...

Trarigardante la numeron 1978/1 denove estas trovebla artikolo pri la hungaroj:

– ... alvenis delegitaro de Hungara-Soveta Amikeca Societo, kiun partoprenis tri personoj de la centra direktoraro de tiu Societo. Reĝisoro de la teatro „Attila József" en Budapeŝto, Árpád Benedek; mezlerneja direktoro el urbo Zalaegerszeg, László Pálfi, kaj la ĉefo de sekcio de la elektra ampoltuba uzino en urbo Vác, Imre Gót.

– Dum nia restado en Taŝkento, Buĥaro kaj Samarkando – diris Árpád Benedek – ni observis multajn faktojn kaj ni opinias, ke ni povas pli forte komenci la reciprokan ŝanĝon de spertoj pri la laboro de niaj Societoj, kaj kun komuna interkonsento certe elkreskos pli forta kontakto inter ni. La amikeco ne estas nura devizo, sed vivkapabla entrepreno, kiu kontribuas por la progreso kaj firmigas la interrilatojn inter niaj landoj kaj popoloj en la kampo de la ekonomio, politiko kaj kulturo ...

Szilárd *Bálint*

Leono Kazancev:

MEZNOKTE

Ĝi staras sola, grandioza,
el bronz' gisita monument',
malvarma, frosta kaj moroza ...
Ĝin preterflugas temp-torent'.
Kopio de l' famul' – statuo –
senmovas sub la neĝa krust'.
Ĉu ronĝas ĝin senlim-enuo
aŭ rust'?

SONETO

La fraton frato murdas, buĉas,
ŝtatestroj al popol' mensogas,
juĝistoj kruelege juĝas
la Veron. Iu demagogas.

Jen la bandit' faŝista puĉas.
Poeton la prizon' sufokas.
Orkestr' lugubre muĝas, muĝas.
Ĉerkaro piramide stokas.

Nenie estas paradizo.
Ni vidas sole nur miraĝon.
Orgias stulta „civilizo",

kaj pelas for la menson, saĝon.
– Do estas tempo jam, amiko,
demeti la okul-bandaĝon.

Sándor Gáspár, prezidanto de la Monda Federacio de Sindikatoj

Sándor Gáspár, kiel prezidanto de la Monda Federacio de Sindikatoj parolas en Prago

La Mondfederacio de Sindikatoj en aprilo havis sian 9-an Kongreson en Prago, dum kiu multaj sindikato-centroj prezentis sian aliĝon al la federacio, precipe el la evolu-landoj.

La kongreso elektis ankaŭ la novan estraron de la Mondfederacio. La nova prezidanto iĝis la konata amiko de Esperanto: Sándor *Gáspár,* ĝenerala sekretario de la hungara Konsilio de Sindikatoj (SZOT). Tiu elekto estas konsiderinda, kiel alta rekono de la hungara sindikata movado, kaj de la persona agado pormovada de Sándor *Gáspár.*

Estas konate, ke la hungara Esperanto-movado – sub egido de SZOT – ĝuas gravan moralan kaj materian subtenon de la hungara sindikataro, la personan atenton de Sándor Gáspár kaj de lia stabo. La estraro de HEA ofte estas invitita al tutlandaj aŭ teritoriaj konferencoj de la sindikatoj, kie prezentiĝas abunde da eblecoj por disvastigi informojn pri nia movado, kaj akiri diversajn apogojn por la teritoriaj aŭ lokaj Esperanto-organizaĵoj, respektive E-rondoj. Nia movado, kiel afero de la laboruloj, estas do alte taksata de la sindikatoj, kaj tial delonge ĉiamaniere subtenata de ilia flanko.

La gravecon de la Internacia Lingvo por la laboristaro klare konsideris Sándor Gáspár en sia internacie famiĝinta intervjuo (vd. Hung. Vivo 5/1974.), en kiu li, inter aliaj, pledis por internacia sindikata kooperado antaŭenigi la instruadon kaj uzon de Esperanto inter laboristoj de la mondo. En lia alvoko esprimiĝis vera internaciismo, karakterizanta lian agadon ĝenerale: ties rekono manifestiĝis ankaŭ per la ĵus atingita alta posteno.

La hungaraj esperantistoj, HEA kaj Hungara Vivo kore deziras al li multajn sukcesojn ankaŭ en lia nova, gravega tasko!

Géza Képes

SOVAĜĈEVALOJ

– Mongolio, 1954 –

Poet' liberamanta, milda, lernu:
sovaĝĉevalojn en la kor' enfermu,

ilian kapon, la fieran, stretan
kaj la koloron, la sablobrunetan,

piedojn sveltajn, famajn pro la lerto,
kiujn bruligas sen kompat' dezerto.

Galopas ili, flirtas kolhararo,
en la dezerto flugas polv' en aro.

Ekhalt'. Piedoj sinkas en greseton,
oreloj akraj aŭdas eĉ brueton.

Okuloj viglaj kiel fulmoj brilas,
al radianta sunolum' similas.

La sunolumo bruletigas brustojn,
ventet' susura movas la arbustojn.

La spir' de l' ter' bruligas arde, flame,
sed akvon serĉi estus vane, vane. –

Nun unu henas, tremas la nazlobo,
ĝi skuas kolhararon. Ekgalopo!

Galopas ĉevalaro fenomene,
en polvo-nubo malaperas plene . . .

Ĉi bild' senĉese vivas en memoro:
ĉeval-okulojn vidas mi el foro. –

Ne provu dresi animalon tian,
ĉar ja disrompos ĝi eĉ oston vian.

Se ruze en kaptilon vi faligos
kaj ĝin iele per katen' vi ligos:

pro l' rara kapt' la ĝojo estus vanta,
ne povos vi forporti ĝin vivanta –

eĉ en kateno pri liber' ĝi revos,
kaj en la kaptitec' la koro – krevos.

El la hungara: Julio Varga

La filino de la bovpaŝtisto

Ĉu estis, ĉu ne estis, trans la Fabelmaro vivis reĝido. Tiu reĝido forte decidis, ke li travagos la tutan mondon kaj ne ripozos ĝis li trovos konvenan edzinon. Ne gravas, ĉu ŝi estos filino de reĝo aŭ tiu de bovpaŝtisto, nur ŝi estu laŭ lia prefero.

Disvastiĝis la famo en la tuta lando, eĉ ekster ĝi, kaj kie iris la reĝido, ĉie amasiĝis la popolo por saluti lin: venis maljunuloj kaj junuloj, fraŭloj kaj knabinoj, jes, precipe knabinoj.

Foje en iu vilaĝo la reĝido ekvidis knabinon inter la aliaj, kiu forte ekplaĉis al li. Rekte li iris al tiu knabino, alparolis ŝin kaj demandis: Kies filino vi estas, franjo?

– Mi estas filino de la bovpaŝtisto, reĝida moŝto – respondis la knabino.

– Ne gravas, estu filino de kiu ajn, mi edzinigos vin.

Tuj li sidigis ŝin en kaleŝon, kaj veturigis hejmen la filinon de la bovpaŝtisto. Ili geedziĝis, farante pompan edziĝfeston.

Sed por ne konfuzi la fadenojn de la rakonto, mi diru, ke antaŭ la geedziĝo la reĝido turnis sin al ŝi:

– Aŭskultu, knabino, vi estas laŭ mia prefero, sed mi edzinigos vin kun tiu kondiĉo, ke vi neniam kontraŭdiros al mi. Kion mi faros, tion akceptu ĉiam bona, ne havu vorton kontraŭ ĝi.

La tempo pasis, ili vivis en paco. Sed foje okazis, ke malriĉulo venis por plendi al la reĝo.

– Reĝa moŝto – diris la malriĉulo –, kun mia najbaro ni iris en la urbon. Mi kondukis du ĉevalojn, kaj li du bovojn. Unu el miaj ĉevaloj havis idon. Survoje ni tranoktis. Kiam ni ekiris, la ĉevalido aliĝis al unu bovo de mia najbaro, kaj ne volis reiri al sia patrino. Tiam la najbaro diris, ke mia ĉevalido estas lia, kaj ne volas redoni ĝin. Reĝa moŝto, faru juĝon!

– Bone – diris la reĝo –, mi faros juĝon, sed vi ne ĝojos pro ĝi, malriĉulo, ĉar ankaŭ laŭ mi al tiu apartenas la ĉevalido, kiun ĝi postiras.

Foriris la malriĉulo malgaje, malĝoje, ĉar eĉ ĉe la reĝo li ne trovis justecon, sed en la alia ĉambro la reĝedzino haltigis lin kaj diris:

– Malriĉulo, mi aŭdis, kian juĝon faris mia edzo. Iru en la arbaron, kie mia edzo kutimas ĉasadi, portu kun vi reton kaj metu ĝin sur trunkon.

La reĝedzino diris ion ankoraŭ, sed tion mi ne volas nun malkaŝi. Iris la malriĉulo en la arbaron, portis kun si reton, metis ĝin sur trunkon, kaj li tenis la reton kvazaŭ li fiŝkaptus. Li eĉ ne sidis unu horon, kiam venis la reĝo. Li rigardis, rigardadis, kion faras la malriĉulo. Li ne povis senvorte elteni kaj demandis:

– Kion vi faras ĉi tie, malriĉulo?

– Mi fiŝkaptas, mia reĝa moŝto.

– Kion vi diras, malriĉulo? Kiamaniere trunko povus havi fiŝon?

– Tiel, kiel bovo ĉevalidon.

Ekhontis la reĝo. Tuj li ĝustigis la decidon, redonigis la ĉevalidon al la malriĉulo. Sed li tuj pensis, ke tiun ruzecon instruis al la malriĉulo lia edzino.

Reveninte hejmen, tuj li diris kolere al la edzino:

– Nu, edzino, vi kontraŭdiris al mi, kvankam vi ĵuris, ke vi neniam faros tion. Do, vi ne plu havas lokon en mia domo. Reiru al via patro!



La reĝino ploris, sed vane ŝi ploris, ĉar la reĝo ne paciĝis.

– Bone – diris fine la edzino –, mi foriros. Sed kion vi donos al mi rekompence por tio, ke ĝis nun mi estis via edzino?

La reĝo respondis:

– Mi donas al vi tion, kio estas la plej kara por vi, nur foriru el la domo.

La reĝedzino iris kaj venis, preparis sin por la foriro, kaj poste por la lasta fojo ŝi ankoraŭ sidiĝis al la tablo de la reĝo, kaj ili kune tagmanĝis. Kiam la reĝo ne vidis tion, ŝi miksis dormigilon en lian vinon.

Baldaŭ la reĝo komencis oscedi, fermiĝis al li la okuloj, li klinis sin sur la tablon kaj endormiĝis. La reĝedzino atendis nur tion. Ŝi alvokis la servistojn kaj portigis la reĝon al la kaleŝo, kaj ŝi veturis hejmen al sia patro, la bovpaŝtisto.

Vekiĝinte en la domo de la bovpaŝtisto, la reĝo ĉirkaŭrigardis, kaj mire demandis:

– Kiel mi venis ĉi tien?

– Kara mia edzo, vi diris al mi: mi rajtas porti la plej karan por mi. Ĉar por mi vi estas la plej kara, do mi portis vin.

Tuj forflugis la kolero de la reĝo, li ĉirkaŭbrakumis kaj kisis la edzinon. Ili sidiĝis en kaleŝon, veturis hejmen, kaj vivis ĝis la morto kiel la kolomboj.

Tradukis Maria *Benczik*

Gunnar Nilsson

FLAMA MARO

Okuloj viaj
similas
al unua senluna nokto de l' tarda aŭtuno
al klara fonto
profunda fonto
mi sinkas
ŝvebante en la mezon de l' pupiloj
en la centron de l' umbiliko
ripozante ĉe viaj mamoj
dum hela nokto
kaj nigra nokto
ankoraŭ
antaŭ unua alpaŝo
de l' novtago
antaŭ ol
unua zefiro
de l' freŝa mateno
alvenis
antaŭ ol la suno de l' zenito
transformis
en cindron
postsignojn niajn.

Erik Ransemar

SURVOJE HEJMEN

La glaciò ankoraŭ kuŝas.
Hejmen mi iras. Marto.
Mi devas ripozi. Mi devas dormi.
Mi devas paroli
– kun mi mem.

DANKON

Foje ĉiu devas morti.
Okazas tio dum silento nokta.
Tial eble pli konvenas
ĉe la taga lumo
diri dankon kaj adiaŭon.

LA VAKUO ESTAS SUPRE

Dum mi konstruadis Empire State Building
ĉiun matenon mi etendis
la manon tra la fenestro
kaj salutis la nubojn.
Dolaron neniam mi ricevis.

El la sveda: *Zora Heide*



Noémy Tavaszy: Počitelj, Jugoslavio

LA ESPERANTA TRADUKARTO

La 11-an de aprilo okazis renkontiĝo de esperantistaj tradukistoj en la klubejo de la Hungara Verkista Asocio. Tiu ĉi kunveno en la prestiĝa loko ne estis la unua, kaj ĝin ankaŭ nun partoprenis krom esperantistoj pluraj elstaraj literaturaj tradukistoj de la hungara lingvo.

La temo de la kunveno estis: „Problemoj de la tradukado al Esperanto". La diskuton enkondukis Mihály *Gergely,* verkisto, ĉefkunlaboranto de Hungara Vivo. Skizante la historion de la literatura aplikado de Esperanto, li atentigis pri la grava servo, kiun esperantistaj tradukistoj faras por la diskonigo de la hungara literaturo en la tuta mondo. Liajn vortojn ilustris improvizita ekspozicieto de esperantaj libroj en la klubejo.

Kiel bazo de la diskuto servis krom la enkonduko referaĵoj de V. *Benczik* kaj I. *Szerdahelyi.* D-ro Gyula *Ferenczi,* gvidanto de la Portradukista kaj Porinterpretista Instituto de la Budapeŝta Universitato „Eötvös Loránd" tuŝis la problemojn de la faklingva tradukado, argumentante por la enkonduko de *preciza* lingvo, kiel Esperanto. Ĉiuj tri referantoj prezentis science koncepitan argumentaron pri la aplikebleco de Esperanto por literatura kaj faka tradukado, citante konkretajn ekzemplojn pri la esprimkapablo de la lingvo.

Aktive partoprenis la diskuton ankaŭ neesperantistaj ĉeestantoj. Inter ili tre favore kaj subtene parolis pri Esperanto György *Radó,* renoma tradukisto el pluraj lingvoj, ĉefredaktoro de *Babel,* plurlingva revuo de la Internacia Asocio de Tradukistoj.

La enhavon de la diskuto resumis Sándor *Rákos,* konata hungara poeto, prezidanto de la Tradukista Sekcio de la Hungara Verkista Asocio. Li esprimis la deziron de la Asocio aranĝi estonte tiajn kunvenojn pli ofte, por krei vere harmonian kunlaboradon inter tradukistoj al Esperanto kaj tradukistoj el aliaj lingvoj al la hungara.

Tamás Pintér

FRAZMODELOJ

– *Ne connaissez vous pas un café tranquille ou il n'y a pas de musique?* Ĉu vi ne konas trankvilan kafejon sen muziko? *Mais si, mon ami!* Kial ne, mia amiko! *Je viens justement . . .*

– Nu, kioestass tioĉi?

– Mi raportas, simplaj frazmodeloj.

– Ĉuvi tieĉi lernadass, homulo? Vihavass nervojn el ŝnurego, onidevass rekkoni.

– Mi raportas, estas iom pene. Precipe depost miaj okulvitroj estis konfiskitaj.

– Residiĝu. Kaj neraportu. Vinedevass raporti. Porvi la regulloj nevallidass. Miemmass flankenrigardi.

– Dankon.

– Miaflanke vipovass trankville lernadi. Doŭrigu, kvazoŭ mineĉeestuss.

– Tiom ne urĝas.

– Kio koncernass tion, onkoŭ mipensass tielle. Minepovass digesti, ke unu klera homo tieĉi ĉiuntempon lernadass, kielle unu lernejbubo. Javineestass enla lernejo, homulo. Tutte ne! Ĉuvi sciass, kioatendass vin?

– Jes, mi scias.

– Vidirass, visciass. Tiam perkia diablaĵo vipovass klarigadi tiunĉi afferaĵon? Ĉardevass esti iaajna klarigado.

– Mi deziras utiligi la tempon.

– Kaj ceteraĵaron vinesciass pripensadi?

– Momente ne.

– Ĉar vimissuzass lavian menson. Protio javiestass tieĉi. En lavia loko miokupuss min pri ceteraĵaroj.

– Pri kio ekzemple?

– Tieci nurmirajtass demandadi. Ĉuestass klare?

– Jes.

– Nu, bone. Ĉevi miemmas flankenrigardi. Nurdemandu kuraĝe. Ĉuvinehavass demandindaĵojn?

– Mi raportas, ne.

– Kvankam mivolonte respondaduss. Mijamestass unu tia homo. Mihavass unu veran komprenemman karakteron. Javipoviss rimarkadi tion.

– Ho, jes. Jam dekomence mi tion spertas.

– Tromalsevera miestass, onidirass. Kaj protio mihavass ĉiaspecajn mallagrablaĵojn. Jam onkoŭ provi mibrulligis almi la fingrojn, homulo. Jam multfoje midiriss almi, ke midevuss fini la liberalismecon. Midiriss, miestass unu brutto, se miriskass la tiunĉi bonan postenon. Sed lakonscienco ne allassass, kemi malbonigu laviajn lastajn tagojn. Jamipovuss konfiski onkou lavian libron. La tiuĉi lernado porvi estassja absollute superflua. Ĉune? Nujess, kompreneble jess. Ĉuvi nepovass kompreni tion? Viestass unu treobstina personulo, oŭdudo. Nur lernadass tieĉi, kvakkam neniam vipovoss utilligi tion. Pormi tio ŝajnass suspektinda afferaĵo. Lavia aĉega trankvilleco nenielle plaĉass almi. Devass esti unu io, certe. Kelkajn bubojn mijamvidiss tieĉi, vijapovass imagi, eĉ kelkajn pezajn bubojn mirenkontadiss, sed tian mionkoroŭ neestiss vidanta, kiuestuss povanta lernadi. Protio midirass, kevi ionkaŝass demi. Sed la tiun afferaĵon mi finsolvoss, ĉuvikredass?

– Jes, mi kredas.

– Ĉuvihavass rimarki ion?

– Laŭ la proverbo: „Kiom da lingvoj vi parolas, tiom da homoj vi valoras".

– Nu, nu, nur ne tielle malmodestulece.

– Mil pardonoj.

– Haltu la marŝo! Vijapovuss aldoni, ke „sinjoro inspektoro".

– Jes, sinjoro inspektoro.

– Nu, vidu, javiscipovass tamen konduti vin. Ĉune?

– Jes, sinjoro inspektoro.

– Kiovera, tiovera, estass rekte unu domaĝo, kevi tielle finoss. Nur unusolla veo, kaj jam pereoss tiuj multaj klerecoj. La viaspecaj personuloj jamdelonge devuss eltrovi ion, mipensass, unu effikan metodon, per kiu la scion onipovuss konduki en alliulon. Ekzemple vidiruss simple: „Vidu, sinjoro inspektoro, mi lassoss porvi tion, kioestass enla mia kapo, utilligu ĝin enbona sano." Kaj kio estass tie enla via cerbo, tio ielle trafluuss enla mian. Ĉar kiom kostuss tio? Neniom. Javi nebezonass plu.

– Interesa ideo.

– Mimetiss la muŝon enla vian kapon, ĉune?

– Bedaŭre, tio estas *nonsens.*

– Kio? Ekstariĝu, tiel raportu!

– Jes. Mi raportas al sinjoro inspektoro, ke la tiucelaj eksperimentoj ankoraŭ ne rezultis kompleksan sukceson. Kvankam laŭ la hipotezoj, ĉe feliĉa kongruo de certaj cirkonstancoj ne maleblas spirita transplantado ĝis ia grado.

– Kaj nun onikondutass sin impertinente? Ĉu?

– Eĉ la penso pri tio estas for de mi.

– Ĉar minerekomendass tion. Tieĉi neestass unu kutimo impertinentadi. Miesperass, nikomprenass unulaallian. Kaj nekutime onkoŭ blufi. La impertinentado kaj la blufado malutillas por la sano.

– Mi komprenis.

– Kaj onkorou unu afferaĵo: seeble, netraboru min perla via rigardado, tio ekjukass min. Virigardass min tielle rigide, kvazoŭ ŝatuss min ekzamenadi per Reggen-radioj. Mijanehavass tuberkulozon.

– Pardonu. Mi nur koncentris al la temo min.

– Nu, onkoroŭfoje miemmass flankenrigardi. Eksidiĝu. Sed miavertass vin, neprovu mistifiki min.

– Mi raportas al sinjoro inspektoro, la scienco okupiĝas pri tiu problemo, oni faris jam diversajn eksperimentojn.

– Nu, jen. Nunjam vipovass vidi, kemi neparolass aeron alla ventoj. Io kaj allio tamen troviĝas onkoŭ enla mia kapo. Kaj eĉ, semiestuss vizitinta onkoŭ la lernejon! Sed minepoviss tion. Mifiniss nur tri klassojn. Jess, ja.

– La sinjoro inspektoro nur ŝercas.

– Minekutimas ŝercadi, homulo. Vijapoviss rimarki tion. Loŭvi oni devass esti scienculisto por eltrovi tian tresimplegan afferaĵon? Setio estuss lamia devaĵo, mijam delonge estuss

metinta la finan punkton alĝi. Eble, la scienculistoj ne ĝustaloke esploradass. Oŭ ili eĉ nevollass solvi tion. Neestass la ilia interessaĵo.

– Tio servus la interesojn de la tuta homaro.

– Mioŭskultass vin.

– Tiuj eksperimentoj baziĝas ĝenerale sur transcendeblo de elektraj osciladoj kaj ondoj. Estas fakto, ke la homa korpo daŭre produktas kurenton. Kaj la biologiajn impulsojn kaj signojn alia biologia sistemo teorie povas ankaŭ kapti.

– Onkoŭ mipensass ielle tielle.

– Oni devas elekti konvenajn individuojn, ĉar ne ĉiu havas la bezonatajn bazajn kvalitojn.

– Nealudau, homulo! Mipreferass la sinceran paroladon. Dirunur, kion vipensadass.

– Laŭ via ordono.

– Eligu kuraĝe!

– La sinjoro inspektoro pro sia kapacito tutcerte estus konvena por funkcii kiel akceptanto, ĉar viaj intelektaj karakterizoj estas sufiĉe pregnantaj.

– Nemidiriss . . .

– Neniel estas hazarde, ke inter la sinjoroj inspektoroj vi havas la plej altan rangon.

– Mijam delonge devuss esti unu oficiro.

– Mi raportas, la sinjoro inspektoro fariĝus ne ia ajn oficiro.

– Misciuss kionfari, tutcerte. Ĉiodependass de la intelligenteco.

– Kaj de konscienco.

– Nu jess, homulo!

– Kaj de justeco.

– Tion onkoŭ mivolliss diri. Tio ĉemi ekzistass. Vijapoviss spertadi.

– Ĉar kie la honesto mankas, tie povas okazi ĉia kalumnio. La historio estas plena de senkulpaj viktimoj.

– Vividass fakte kernon dela afferaĵoj, homulo. Miĝojass, kevi apartenass almi.

– Mi petas pardonon. Mi pensas, ke mi trapaŝis la limon. Mi scias, ke pri tiaj aferoj paroli estas malpermesite.

– Nur lassu almi tion. Ĉevi miflankenrigardas. Vineestass iaajna kaptitulo.

– Vi min honorigas.

– Miestuss scivolemma, kiu kuraĝadass enŝovadi la sian nazon enla mian konversaciadon. Vekiĝu frummatene, kiuvollass superruzi min. Ĉumi estass komprenata?

– Jes.

– Allia rimarkindaĵo?

– Malestas.

– Demandaĵo, deziraĵo, petaĵo?

– Same, sinjoro inspektoro.

– Bone, mineŝatass la lamentadojn.

– Mi komprenas.

– Tamen eble mivpovass fari porvi ion.

– Danke mi akceptos.

– Miĉirkoŭrigardoss, kion mipovuss fari.

– Dankon.

– Miaflanke, vitrankville povass lernadi, sevihavass emmon.

– Vi estas senfine grandanima.

– Tioestass la minimumaĵo.

– Mi neniam forgesos, sinjoro inspektoro.

– Nu, levu la vian kapon, homulo!

– Ĝis revido, sinjoro inspektoro. Se estas permesite tiel diri: *Au revoir, Monsieur.* Ĝis revido, sinjoro.

– Vipovass diri, mipermessass.

– *Merci.* Dankon. *Ne conaissez vous pas un café tranquille ou il n'y a pas de musique?* Ĉu vi ne konas trankvilan kafejon sen muziko? Ĉu vi ne konas hazarde?

Tradukis: Márton *Fejes*

Noémi Tavaszy: Cirkaŭfermita (Ĉeĥoslovakio)

Aldo di Giorgi

LA VOĈO DE L'SILENTO

Aŭskultu,
la silento milnuance sonas,
softe,
tamen percepteble,
kaj sufloras velurajn emociojn.
Aŭskultu,
ĉu vi ne aŭdas
la melodiojn de sennombraj mondoj,
de mil fantastaj estoj,
de la deziroj,
de la prarevoj,
de la senfinaj viaj vioj?
Aŭskultu
de l' tuta kosmo la mirindan,
misteran susuradon,
de ĉiu herbfadeno,
de ĉiu insektflugo
l' ĉeeston vivinstigan.
Aŭskultu,
aŭskultu la dolĉan flustron de l'silento
kaj vi neniam solos.

LEHEL

KOMPRESORA HEJMA FRIDUJO

HB 200 ***

ultrafridujo 20-litra, -18 C°



Produktas: HŰTŐGÉPGYÁR Jászberény

I. Lejzerowicz

EL LA „VERDA BIBLIO"

I. Lejzerowicz (1901–1944?) estis unu el la plej talentaj figuroj de la esperanta ĵurnalismo inter la du mondmilitoj. Liaj spritaj kongresaj raportaĵoj kaj aliaj artikoloj aperis ĉefe sur la paĝoj de Literatura Mondo. Tie presiĝis ankaŭ la unuaj ĉapitroj de lia trafa satiro *El la „Verda Biblio"*. Li mortis martire en la koncentrejo de Treblinka, verŝajne en 1944.

Hungara Esperanto-Asocio omaĝas al lia memoro per reeldono de *El la „Verda Biblio"*. Ĉisube ni publikigas specimene la unuan ĉapitron de la verko.

Ĉapitro I.

1. En la komenco la Senkorpa Mistero kreis Volapükon. 2. Kaj Volapük estis senforma kaj kaosa, kaj mallumo estis en ĝi. 3. Kaj la Senkorpa Mistero diris: Estu lumo; kaj fariĝis Esperanto. 4. Kaj la Spirito vidis Esperanton, ke ĝi estas bona; kaj la Spirito nomis Esperanton Eterna Tago, kaj Volapükon nomis Nokto. Kaj estis vespero, kaj estis mateno – unu tago.

6. Kaj la Spirito diris: Estu firmaĵo en la lingvo. 7. Kaj la Spirito kreis tiun firmaĵon. 8. Kaj Li nomis la firmaĵon regula akcento. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la dua tago.

9. Kaj la Spirito diris: Kolektiĝu la reguloj gramatikaj en unu lokon kaj aperu la firma grundo; kaj fariĝis tiel Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. 10. Kaj la Spirito diris: La Fundamento kreskigu verdaĵon, kiu naskas ĝojon, vortaron, kiu donas laŭ sia speco radikojn, kies semoj estas en ĝi mem, en la Fundamento. Kaj fariĝis tiel. 11. Kaj la Fundamento elkreskigis verdaĵon laŭ sia speco: verdan lingvon kaj verdan movadon, vortaron kaj arbaron, kiu havas radikojn, kies semo estas en ĝi mem, en la Fundamento. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. 12. Kaj estis vespero, estis mateno, la tria tago.

13. Kaj la Spirito diris: Estu lumaĵo en la ĉiela firmaĵo, por apartigi Esperanton de mallumo. 14. Kaj ĝi estu lumaĵo por lumi super la tero, kaj fariĝis tiel. 15. Kaj la Spirito faris la grandan lumaĵon por regi la mondon. 16. Kaj la Spirito starigis ĝin super la ĉiela firmaĵo, por ke ĝi lumu sur la Teron. Kaj la Spirito nomis la lumaĵon Verda Stelo. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. 18. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la kvina tago.

19. Kaj la Spirito diris: la vortaro aperigu moviĝantaĵojn, vivajn estaĵojn kiuj fleksebligos la Lingvon. 20. Kaj la Spirito kreis afiksojn, kiujn aperigis la Vortaro, la sufiksojn kaj prefiksojn laŭ ilia speco. Kaj la Spirito vidis, ke ĝi estas bona. 21. Kaj la Spirito benis ilin dirante: Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la vortaron. (Kaj tial afiksoj tiel multiĝas ĝis nun.) 22. Kaj estis vespero, estis mateno, la kvina tago.

23. Kaj la Spirito diris: La Vortaro aperigu vivajn estaĵojn, brutojn kaj vermojn. 24. Kaj la Spirito kreis la neologismojn, kaj ĉiujn malfacilajn vortojn laŭ ilia speco, por eterna turmento de la novaj verduloj. 25. Kaj la Spirito diris: Ni kreu potencan aferon, kiu respegulos nian internan potencon; kaj ĝi estu la akso de la lingvo kaj ĝi regu ĝian gramatikon. 26. Kaj la Spirito kreis la Akuzativon; en formo de la finaĵo *N* Li kreis ĝin. 27. Kaj la Spirito diris: multiĝu kaj plenigu la verdan lingvon kaj regu super ĉiuj ceteraj reguloj de la Fundamento. (Kaj depost tiam ĉiuj verduloj uzas la akuzativon en troa abundo.) 28. Kaj la Spirito diris: Jen mi donis al vi ĉiujn regulojn de la Fundamento. Ĝi estu por vi sanktaĵo. Kaj farigis tiel. 29. Kaj la spirito rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona. Kaj estis mateno, kaj estis vespero, la sesa tago.

30. Kaj estis finitaj la Fundamento kaj Radikaro kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj. 31. Kaj la Spirito finis en la sepa tago sian laboron, kiun li faris, kaj li ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kiun li faris. 32. Kaj la Spirito benis la sepan tagon kaj sanktigis ĝin, ĉar en ĝi Li ripozis, legante la originalan literaturon, kiun li faris kreante.

I. Lejzerowicz

EL LA „VERDA BIBLIO"

Titolpaĝo kaj ilustraĵo de la libro ĵus aperinta





Siklós – komuna koncerto en la korto de la mezepoka fortikaĵo

PANORAMO

FORTIKAĴ-FESTIVALO

La bele renovigita mezepoka fortikaĵo Siklós en la sudhungarlanda departemento Baranya donis lokon por speciala festivalo la 10-an kaj 11-an de junio. Jam tradicie estas aranĝata ĉi tie Tutlanda Renkontiĝo de Blovorkestroj, kiun ĉisomere partoprenis ankaŭ tri eksterlandaj ensembloj; el Belgujo, Finnlando kaj Sovetunio. Alia novaĵo estis en la ĉijara programo, ke ankaŭ junularaj, kaj jun-pionir-orkestroj aperis nun en la vico. Nekutima travivaĵo estis la sabatvespera festa koncerto en la proksime situanta subĉiela statuo-muzeo, kie dum la muziko, laŭ la partituro la statuoj estis iluminitaj per specialaj lumefektoj.

PLI DA LOKO POR GEJUNULOJ

Proksimume 600 mil gejunuloj ripozis dum 1977 en la tendaroj kaj studentaj hoteloj de EXPRESS (speciala vojaĝoficejo por gejunuloj kaj studentoj). En la nuna jaro la oficejo certigas lokon por pliaj 100 mil junaj gastoj.

Internacia junulara tendaro de Express en Balatonföldvár kun lignodometoj
Fotó: Katalin *Kutas*

GEJUNULOJ SOLIDARAJ

La tago de internacia junulara solidareco estas konata festo jam de pluraj jaroj. Kun partopreno de studentoj speciale el la tria mondo, hungaraj junularaj organizoj en multaj urboj aranĝas kunvenojn kun prelegoj, kiuj turnas la atenton de gejunuloj al popoloj ankoraŭ luktantaj por sia libereco kaj sendependeco. Ofte en ĉi tiuj aranĝoj alparolas ankaŭ reprezentantoj el landoj de la tria mondo. Ili estas studentoj, kiuj elektinte diversajn fakojn diligente studas en Hungario por povi post kelkaj jaroj kiel bonaj fakuloj helpi en la evoluigo en sia patrolando. La kunsento, kiu manifestiĝas en tiaj grandaj aranĝoj, – kaj ankaŭ en la ĉiutaga vivo, en la lernejoj aŭ laborejoj – multe helpas al ĉi tiuj gejunuloj, kiuj malproksime de siaj patrujo kaj familio ofte pensas maltrankvile pri la hejmaj zorgoj. Unu el la multaj solidarecaj aranĝoj okazis en la nordhungarlanda urbo Miskolc. Ĝin organizis la Centra Komitato de la Komunista Junulara Asocio kaj ties Departementa Komitato. Pluraj miloj da gejunuloj partoprenis la kunvenon kaj salutis la gastojn, interalie la prezidanton de Monda Federacio de Demokratia Junularo (MFDJ) Erneston Ottonen, estraranojn de junularaj organizoj kaj gvidantojn de la departemento kaj de la urbo. Post la prelegoj buntaj prezentadoj de junularaj ensembloj donis festan programon.

Sur nia bildo en Miskolc grupo de studentoj el Sudano, lernantaj en Hungario, prezentas folkloran muzikon kaj dancon.

PANORAMO

Granda publiko ĝuas la spektaklon de belaj ĉevaloj kaj lertaj kaleŝistoj

MONDĈAMPIONADO DE KALEŜISTOJ

Unu el la plej gravai eventoj de nia sporta vivo estos la mondĉampionado de kaleŝistoj en aŭgusto en la urbo Kecskemét. Jam ĝis nun 14 landoj aliĝis kun 40 kvarĉevalaj sportĉaroj al la konkurso. Krom la diversspecaj tereno-konkursoj folkloraj ensembloj kaj rajdistaj spektakloj amuzos la publikon.

JUNAJ KOSSUTH-PREMIITOJ

Zoltán Kocsis

La 1-an de aprilo, okaze de la 33-a datreveno de liberiĝo de nia patrujo estis disdonitaj la ĉijaraj Kossuth-premioj en la kupolo-halo de la Parlamentejo.

Inter la scienculoj, inĝenieroj, elstaraj membroj de laboristaj-brigadoj, vilaĝaj kuracistoj kaj instruistinoj de plurjardeka reputacio ni trovas du apenaŭ dudeksep jarajn fortepianartistojn, kies nomoj pere de pluraj gramofondiskoj kaj multaj koncertoj eksterlandaj jam estas konataj dise en la mondo.

Dezső Ránki

MODUL MOMATIC 100 S



1 2 3 4 5 6

Surbaze de hungara inventaĵo la Optika Fabriko MOM en la proksima estonto komencos produktadon de novtipa aŭtomata aparataro analiza. Per helpo de tiu ĉi aparataro oni povos rapide analizi multnombrajn specimenojn (30–60 specimenojn dum horo) de simila konsisto. La nova analiza aparato estas aplikebla al multaj bezonoj de la klinika analizado, analizo de medikamentoj, mezuradoj en sfero de la mediodefendado.

Ĝi konsistas el:

1. Likvaĵo-pumpilo
2. Specimenujo por 200 specimenoj; specimen-ŝanĝilo
3. Analiza bloko, konsitanta el eniga mezurilo por specimen-solvaĵoj kaj el detektilo-ĉelo de voltametraj elektrodoj
4. Elektronika bloko por regi la fazojn de la analizado kaj por efektivigo de la instrumenta analizo
5. Registrilo por grafikiĝo de la rezultoj
6. Presilo por eligo de la rezultoj

Tr. D-ro Árpád *Máthé*

DISKUTO PRI LA „REĜEDZINO"

La novelo de G. Heltai: La enfermita reĝedzíno (HV 1977/5) vekis iom vastan reeĥon, unuavice ne pro la enhavo, sed pro la arkaigita lingvaĵo. Ĉi-sube ni publikigas kelkajn alparolojn al la temo.

Esperanto arkaika – Esperanto konfuzita!

Kiu opinias tiel, ke nuntempa hungara teksto per transmeto en deksesa-jarcentan ortografion fariĝus deksesa-jarcenta? Kaj kiu spertis, legante la plej novan eldonon de la novelaro de Gáspár *Heltai*, ke la transskribo de tiu ĉi verko laŭ la nuntempa ortografio malfortigis iom ajn „la arkaitan guston de la kvarcentjara hungara teksto"? Certe neniu. La aktuale uzata sonsignaro preskaŭ neniom karakterizas la lingvostaton mem. (Ekzemple inter la sonsignaroj de *Heltai* kaj György *Hoffgreff*, lia kunlaboranto, presisto-kolego, troviĝas gravaj diferencoj – ĉu ili uzis la lingvon en ĝiaj diversaj statoj?) Ni do povas kuraĝe konkludi, ke la maniero de la skriba fiksado ne efikas pri la kvalito de la verka teksto.

Jen, la dua eraro de la tradukinto, kiu volis redoni en sia tradukaĵo (G. Heltai: La enfermíta reĝedzíno – H.V. 1977/5) la arkaikecon de la originala verko ĉefe per ortografiaj manipulaĵoj.

Sed plupaŝante tiun absurdon, ke *Haszpra* volas prezenti en neniam ekzistinta malnoveca formo tiun verkon, kiun jam eĉ hungaroj ne legas en ĝia originala formo (cetere tiu formo eĉ ne konserviĝis), ni povas rimarki du bazajn problemojn.

1. Kial la tradukinto pensas, ke la dekliniĝo dis de la normala lingvopraktiko, ke la arbitre enkondukitaj ŝanĝaĵoj arkaikigas la tekston, aŭ povas sentigi ion ajn? La unua duono de la ŝanĝaĵoj (la duobligoj, superfluaj supersignoj) signifas nenion, kio aludus al iu pli frua epoko. La dua duono de la ŝanĝaĵoj (la redundance uzataj vortoj, *w* anstataŭ *ŭ*) havas signifon nur por hungaroj, konantaj la historion de sia lingvo. Eĉ, kelkaj obstine konservitaj malnovaĵoj ŝanĝas la sencon de la teksto. Ekzemple: *És mikoron építeni kezdenének, eljöve a király*... (Nehungaraj legantoj pardonu min!) – Ĉiuj erudiciaj hungaraj legantoj scias, ke la verbo estas indikativa kaj istempa, kaj sentas la malnovecon de la esprimo. *Kaj kiáme ili komencuss konstruádi, véniss la rége*... – ĉiuj alilingvanoj kredos, ke la verbo estas konjunktiva, kaj ĉiujn konfuzos, ke ĝi ne aspektas istempa, sed neniu sentos la esprimon malnoveca. Similaj ekzemploj multas. (La lud-traduko de la *Primorta Prediko*, trovebla en la *Lingvo, Stilo, Formo* de Kalocsay, estas interesa kaj komprenebla ankaŭ al nehungaroj.)

Historian lingvostaton oni ne povas artefarite ellabori. Oni ne povas eltrovi ekzemple antaŭkristan francan lingvon, ĉar en la tiama mondo mankis la „franceco". Deksesa-jarcentan Esperanton oni povas eltrovi eĉ malpli, nome Esperanto ne havis kaj neniam povos havi historiajn statojn (diakronion).

2. La misklopodo de la tradukinto prezenti malnova verkon per malnoveca lingvo, estas miskompreno de la tradukista fideleco. Laŭ mi, kaj laŭ la praktiko de ĉiuj gravaj hungaraj tradukistoj (mi aludas nun al nacilingvaj tradukoj), oni devas traduki ĉion en la nuntempan lingvon. Unue tial, ĉar la diferenco inter la tiama kaj la nuna lingvostato ne apartenas al la verko, sekve ĉi tiu diferenco kaj la malfacilaĵoj de kompreno, originantaj en ĝi, estas netradukendaj. Ekzemple angloj nuntempe jam tute ne komprenas la originalan tekston de la praanglaj elegioj – ĉu hungara tradukisto devus traduki ilin tiel, ke ankaŭ hungara leganto komprenu nenion? ! Kaj due tial, ĉar la atmosfero, spirito de la dekoka-jarcenta hungara kaj angla lingvo tute ne egalas. Trie tial, ĉar la homo de la dudeka jarcento simple ne kapablas uzi tiun lingvon, kiun oni uzis antaŭ du jarcentoj, pro la ega aliformiĝo de la pensmaniero.

Estas vere, ke la Esperanta tradukado havas apartajn malfacilaĵojn. La historiaj lingvoj havas eblecojn sentigi la arkaikecon (per nuancoj de gramatikaj formoj, per delikata vortelekto, per elmodiĝintaj alparolaĵoj ktp.), kiuj en Esperanto ne tute, sed preskaŭ mankas. Sed aliflanke, ne ĉiuj scias, ke Esperanto havas tiajn lingvajn eblojn, kiuj mankas en ĉiuj aliaj lingvoj. Estus inde serioze priesplori la teoriajn eblojn kaj maleblojn de nia lingvo el la vidpunkto de la literatura tradukado. Tiun taskon trudas al ni ankaŭ la malsukceso de la pritraktita tradukaĵo.

Sándor *Révész*

„... En la lasta Hungara Vivo mi legis vian interesan kaj tre eltroveman tradukon de la ĉarma hungara renesanca novelo LA ENFERMITA REĜEDZINO. Mi ĝuis viajn tradukistajn fintojn."
Karlo *Piĉ*, membro de la Akademio de Esperanto

Arkaikeco – ĉu konfuziteco?

Ĉiam ĝuante la specialan atmosferon, kiun la hungara, sed ankaŭ kiu-ajn-nacia leganto sentas, kiam li legas malnovajn tekstojn, mi jam delonge ludadis pri la penso provi veki la saman aŭ similan arkaitan guston perhelpe de Esperantlingva traduko. La tasko evidente estas racia, ja en ĉiuj naciaj lingvoj oni renkontas similajn klopodojn konekse kun la tradukado de malnovaj alilingvaj tekstoj.

Estas tute klare, ke se la celo de la traduko estas redoni la *sencon*, la pensojn de la originalo (ekz. de verko de iu malnova greka filozofo), la tradukanto devas uzi la hodiaŭan lingvon per ĝia plejeble *moderna* esprimiveco.

Tamen – kiel ankaŭ la Heltai-novelo, „La enfermíta reĝedzíno" – certaj malnovaj literaturaĵoj prezentas specialan ĉarmon por la nuntempa leganto ĝuste pro sia arkaikiĝin-

ta esprimmaniero kaj arkaikiĝinta ortografio. En multaj kazoj tamen la ortografio estas tiom arkaikiĝinta, ke tio jam signifas gravan malhelpon kontraŭ la ĝuebleco. Tion sentis la redaktoro de la nova hungara eldono de la Heltai-novelaro kaj pro tio li forĵetis la arkaikan skribmanieron. Tamen li ne modernigis la tekston mem, ĉar li ĝuste sentis ke kompleta forigo de la arkaika karaktero jam signifus gravan perdon por la arta plezuro de la hodiaŭa leganto.

Se la redaktoro de la novelaro opiniis ke certa konservado de la arkaikaj trajtoj estas necesa, estas klare kaj rekoninde, se mi, kiel tradukanto, deziris iamaniere respeguli tiun arkaikecon. Por mi – laŭ miaj kapabloj – la metodoj listigitaj ĉe la fino de la tradukaĵo ŝajnis ne tro malfaciligantaj la legadon, tamen, pro la ioma komplikiteco, sentigantaj malnovecon. Ja ĉiuj scias, ke la lingvoevoluo, kiel la evoluo de la ortografio (en ĉiuj historiaj lingvoj, de la angla, tra la rusa, ĝis la ĉina) montras al la simpligo de la formoj, tiel ebligante novajn komplikajn esprimmanierojn por novaj konceptoj kaj novaj, pli komplikaj rilatoj.

Miaopinie, miaj relative simplaj arkaikigaj reguloj efektive servis la celon, kvankam evidente venos tradukistoj kiuj pli efike, pli elegante povos solvi la taskon. Ja, mi emfazas, temas pri *reala bezono*, kiun oni devas plenumi ankaŭ per Esperanto, se ĝi volas esti vere egalrajta kun la naciaj lingvoj. Miaopinie estas perfekta miskompreno de la tasko de la scienco, se oni volas per ĝi pruvi ke io necesa ne estas plenumebla. La tasko de la scienco estas serĉi la vojon por atingi la necesan, aŭ se ĝi ne kapablas fari tion, almenaŭ iel – eĉ per akra, sed ja sciencnivela, kritikado – helpi tiujn ne-sciencistojn kiuj tamen faris efektivajn paŝojn por la solvo kaj kiuj ne ploregis ke la solvo – laŭ la „scienco" – ne estas atingebla.

Mi ne volas ripeti aŭ pli detale disvolvi miajn arkaikigajn regulojn. Kiu volas kompreni, povas. Nur iom pri la uzo de la konjunktivo.

Pri tio mi multe cerbumis. Tamen mi opiniis, ke kvankam aliaj lingvoj en la malnovaj tempoj ne nepre uzis konjunktivajn formojn anstataŭ pasinta indikativo, tamen kulturitaj legantoj post la dua aŭ tria kazo jam eltrovos kaj akceptos, ke ĉi tie la konjunktivo estas ia arkaika ekvivalento de la simpla istempo. Pri tio mi eĉ intertraktadis kun la lingva revizianto de HV, kaj post ioma pripensado li lasis mian solvon.

Mi ripetas. Arkaikeca traduko foje-foje estas reala arta bezono. Do, oni devas ĝin plenumi. Mi provis, kaj eble mi ne estas tro memfida, se mi estas certa, ke iagrade mi sukcesis. Pli bonaj solvoj povas ekzisti kaj certe venos. (Simile ni devas esti optimistaj pri la redono de *dialektaj* paroloj!) Neado de la ebleco de la solvo estas simpla rifuĝo de antaŭ vere ekzistanta tasko, eĉ se farita surbaze de ŝajne scienca argumentado. Feliĉe, eĉ en lingvistaj-filologaj rondoj ekzistas pli kuraĝaj opinioj. Mi vokas la atenton nur pri la saĝaj vortoj de József *Tompa*, kiuj aperis en lia libro, eldonita de la Eldonejo de la Hungara Akademio de Sciencoj*, pri la tradukado de malnovaj, tamen siatempe ne arkaikaj tekstoj:

„. . .Ni opinias, ke parto de la arkaiknuancaj arttradukoj nepre pruvas ke oni povas arte realigi la antaŭlongtempecon eĉ en tiaj tradukoj, kies originalo siatempe neverŝajne enhavis arkaikecaĵojn" (p. 305).

„. . . fine ni devas teni la eblecon ke iu nia escepte altkvalita arttradukisto en la futuro transformos hungaren ian antaŭlonge kreitan fremdlingvan verkon en tia propre arkaika, tempdistanc-tena stilo, pri kiu hodiaŭ ni eĉ ne pensas: kiel tiomfoje en la arto, eĉ ĉirilate la estonta sukceso kapablos rajtigi tian stilkomponadon kian surbaze de la tipaj ĝisnunaj fenomenoj kaj laŭ la hodiaŭaj pritaksado-vidpunktoj ni ne kalkulas aŭ ne konsiderus ĝusta" (p. 306).

Mi pensas ke la diskuto pri la arta tradukado de arkaikaj kaj dialektaj tekstoj estas nepre tre utila. Sekve mi ĝojas ke pro la kritiko far S. Révész tiu diskuto ricevas publikecon. Mia ununura bedaŭro estas, ke mia kritikinto, kiu tiel pasie faris sian argumentadon kontraŭ la ebleco de la solvo, estas ne nur profesia kultivanto (ja E-faka studento) de nia lingvo, sed ankaŭ en tiel juna aĝo, kiam per la sama pasio eĉ la veran neeblon oni devus ataki.

O. *Haszpra*

**Tompa* József: A művészi archaizálás és a régi magyar nyelv (La arta arkaikigo kaj la malnova hungara lingvo). Akadémiai Kiadó, Budapest, 1972.

Alparolo al la diskuto pri arkaikeca traduko

Teksto literatura ne egalas tekston simple komunikan. La diferenco kaŝiĝas en la lingva formo.

Tradukanto de verko literatura klopodas redoni ne nur la enhavon, sed ankaŭ la formon. La tasko estas kontraŭdira: ŝanĝi la formon, doni al la sama enhavo alian formon, t.e. uzi por ĝia esprimo alian lingvon kaj – samtempe – konservi la formon, redoni ĝin, sentigi ĝin, fari ĝiajn nuancojn ĝueblaj ankaŭ en la nova formo.

Legi malnovajn verkojn kaŭzas specialan ĝuon. La dumtempe arkaikiĝintaj trajtoj ravas la hodiaŭan leganton. Ĉu eblas redoni tiun specialan ĉarmon en Esperanta traduko? Plene redoni verŝajne ne eblas. Sed redoni tiom el ĝi, kiom eblas, devas esti la celo de la tradukanto. La tiurilata iniciato de O. Haszpra estas ĝojiga kaj laŭdinda. El la uzitaj de li rimedoj unuj estas diskuteblaj, aliaj trafaj, supozeble riĉigontaj la stilan rimedaron de la Esperanta tradukarto. Ekzemple, la redono de la hungara *mikoron* (anstataŭ la nune uzata *mikor*), *akkoron* (anstataŭ *akkor*) ktp. per *kiame* (anstataŭ *kiam*), *tiame* (anstataŭ *tiam*) ktp. estas solvo perfekta. Kaj ĉe la hungaraj vortoj, kaj ĉe ilia Esperanta traduko temas pri plus unu sufikso adverba, ne aldonanta novan semantikan elementon al la signifo de la vorto. Malgraŭ la „natureco" de la hungara vortoformo en la renesancepoka teksto kaj la „artefariteco" de ĝia – trovita de O. Haszpra – ekvivalento, ambaŭ formoj efikas al la nuna leganto same: li sentas la naivan malrapidemon de la rakonto. (Ne gravas, ke *mi-kor-on* antaŭ kvarcent jaroj egalis *kiu-temp-e*, do la lasta morfemo tiam ankoraŭ ne estis superflua.)

La uzo de kondicionalo en subjunktiva rolo evoluis ankaŭ en la hungara sub fremda – pleje latina – influo. Dum jarcentoj ĝi floris – precipe en tradukoj, sed ankaŭ en originalaj verkoj – kaj poste malaperis. Por la nuna hungara leganto ĝi estas samtiel fremda (kaj samtiel miskomprenebla), kiel por la Esperanta leganto. Laŭ S. Révész pri *építeni kezdenének* „ĉiuj erudiciaj hungaraj legantoj scias, ke la verbo estas indikativa kaj istempa". Ne. La verbo estas usmoda (kondicionala) kaj uzata ĉi tie subjunktive; pri kio S. Révész pensas, estas ne *kezdenének*, sed *kezdének*. Cetere, en Esperanto la kondicionalo esprimas tempon eĉ malpli ol en la hungara.

Ortografio estas demando duagrada, ĉar eksteraĵa. Sed ankaŭ ĝi povas iom kontribui al la etoso de pasintaj tempoj. Ekzemple, superfluaj supersignoj karakterizas ne nur latinliterajn tekstojn mezepokajn, sed ankaŭ grek- kaj cirilliterajn (akcentsignoj, aspiracisignoj). Diftongoj kun *-w* rememorigas ne nur *-ew-* (anstataŭ *-ő-*) en malnovaj nomoj hungaraj, sed ankaŭ ekzemple *-aw* (anstataŭ *-au-*) en malnovaj nomoj germanaj.

Sed ne la ortografio plej gravas en la eksperimento de O. Haszpra, kiu estas interesa, kuraĝa, sukcesa kaj instiga. Ĝi estas nepre salutinda, kaj la eksperimentanto gratulinda.

I. *Botos*

REVUO DE REVUOJ

Nia gazetaro atingis nuntempe, videble, gradon de alta varieco; foliumante en ĝia abundo – estu modeste dirite – prezentas sin mirige interesa gamo de *legaĵoj* ĉiuspecaj. Ne miskomprenu, kara Leganto, des pli ne ŝercu pri *legumoj–legomoj.* Mi aludis sincere, ne cere-monie, je *legindaĵoj* tiel buntaj, ke revuanto apenaŭ kapablas, sian kapon al-kap-tante eĉ, surplumigi la plej incitajn.

El inter la ĉiam altinteresaj, racioplenaj artikoloj de nia ne-sufiĉe aprezata publicisto, d-ro Artur *Bormann,* en la „Interlingvistika Informa Servo", ĵus elstaris tikla eseeto, kiu serĉas klarigon de bone observita fenomeno: altrangaj politikistoj laŭdas ade – antaŭ UK aŭ niaj intervjuistoj – E-o-movadon, ties noblajn celojn, al kiuj ili bondeziras, tamen . . . ŝajne okazas poste nenio, almenaŭ de ilia flanko. Samtempe aliaj politikistoj en aliaj medioj eksplikas siajn dubojn pri la IL, se jam temas pri lingva interkompreniĝo. Konservative ili restas ĉe la erara iluzio: lernu duan lingvon, aŭ utiligu interpretistojn. A. Bormann analizas, ke en la dua vico de la politika maŝinaro troviĝas ĉefe la dubantoj, la miopaj praktikuloj – grandparte pro la ne-informiteco de registaraj rondoj. Ŝajne ene de Unesko, ekzemple, ne estas konata la publika eldiro de ĝia ĝenerala direktoro, M'Bow, ĉar lia sekretariato preparas mondvastan lernadon de „vivantaj duaj lingvoj", komprenu la 4 laborlingvojn de Unesko . . . Konklude verŝajnas, ke eĉ la bonintencaj superuloj atendas de la E-a popolo tian kreskon, kio iĝos jam konvene prema faktoro por la registaroj; alivorte, la bilanco estas atendata.

INTERNACIISTO el Aŭstrio alportis gravan informon: la kongreso de Aŭstria Komunista Partio voĉdone akceptis (233 kontraŭ 13) rezolucion favore al Esperanto, meti ĝin en servon de la laboristo-movado, interkompreniĝi internacie rekta-maniere, sentraduke. Kaj en Anglio (gravege!), kaj en Hungario (vd. prudente praktikajn, per agoj helpemajn intervjuojn de ministroj kaj sindikatestroj, en HV kaj „Mondo kaj Lingvo") la afero progresas do en la agadsfero; kiel sciate, ankaŭ en aliaj landoj. Mi ne miras tamen, kial, en HEROLDO de E., aldemandas s-ano *Fighiera* per varma deziro: kial serĉas ankoraŭ gvidlinion pri Eo la marksismaj partioj, ĉu mankas al ili koncepto pri IL?

La klarigo, ne la respondo kompreneble, kuŝas jam en la malneta demando: oni ne konfuzu koncepton kaj politikajn paŝojn. Aliflanke ne atendu, ke koncerne internajn paŝojn – enkonduki en lernejojn de la lando, k.s. – la diverslandaj partioj agordiĝos inter si. Ja tian metodon, malkonvenan kaj kontraŭ-sendependecan, ili ne uzas, eĉ pri multe pli gravaj sociaj aŭ ekonomiaj problemoj. Fakte, sen *komuna* linio, respondeco de la koncerna partio igos ĝin konsideri – laŭ diversaj niveloj de la IL-problemaro – sian pozicion, en periodo de neceso. Malsame al la laŭdemaj, sed ne apogemaj politikistoj, menciitaj de d-ro A. Bormann, montriĝas do trajto de plia seriozeco: observa atendo je plua maturiĝo de nia monda afero; tiurilate kaj la movado, kaj la Babelon suferantaj hom-amasoj devas ankoraŭ fermentigi de sube.

ESPERANTO EN SKOTLANDO publikis la prelegon de William *Auld* pri la rolo de originala literaturo: erudicie pentrita tabulo pri akademia demando, kiu pli gravas, originala aŭ traduka arto? Lia traktado ekscite argumentadas, ĉiuj anguloj kulturaj, lingvaj kaj propagandaj estas prilumigataj de nia elstara poeto. Mi mem apudstaras al lia flanko: unika fenomeno kaj kulturbazo de nia lingvo estas la *originala* literaturo, per kiu Esperanto estas *ipso facto* pli ol nura lingvo. Mi ne sentas tamen, ke mi kontraŭdiras al mi, se *samtempe* mi elokventas por ega graveco de la tradukado! Esenca rolo de IL, krom lingvo-ĉizado nepre bezonata, *praktike* postulas literaturo-tradukadon – eble multe pli, ol originalan. Sed *al ambaŭ* rilatas eldiro de Lajos *Tárkony,* la eminenta kritikisto, fondinto de ĉirubriko, ja *ambaŭ havas* „sian indan lokon en nia literaturo kaj lingvo" (*De paĝo al paĝo,* p. 88.).

Ekzistas en Esperantio legendo pri la orienta ideografia skribo, kiu samsence estas legebla en multaj lingvoj, utiligantaj tiun skribmanieron. Sufiĉas ideograme skribi, por ke orient-azianoj komprenu, kaj simile respondu . . . OOMOTO rakontas pri fiaska disvaporiĝo de tiu imago. En japana fabriko pendis averto kontraŭ maŝina danĝero: „Sengardo momenta – *vundiĝo* dumviva"; sed ĉinaj vizitantoj komprenis tiun surskribon por prizorgi la maŝinon, ĉar ili legis sialingve: „*Senoleo* momenta – sinkulpigo dumviva". Nu, de longe ĉinoj, japanoj kaj aliaj sam-ideograme skribantaj popoloj legas laŭ tute malsamaj sencoj! – Honoron cetere al la renoma revuo, kiu publikis je la centjara jubileo de *Ady* tri poemojn de li, en trafaj tradukoj de *M. Fejes.*

Por resti iom en la Pacifika malproksimo, mi ĉerpos iom el la belaspekta Sud-Korea revuo, LA ESPERO. Estas tre verŝajne, ke *ni, esperantistoj* havas en Mez-Eŭropo plej multe da ebleco kontakti kaj konatiĝi kun la ekstremorientaj landoj, pro la aliajn plage disigantaj lingvaj baroj. Jen nia avantaĝo; kaj ni povas legi en tiu revuo ankaŭ poemojn de Praganino, poetino *Eli Urbanová,* kaj tiu fakto igas ardi internacieman koron . . . Malardigas bedaŭrinde inte. . .lekteman koron tia prezento de praa, orienta kalendaro, laŭ kiu la zodiakaj, mitaj bestoj *vere influas* ĉies estontecon, utilas do ekkoni ilian ciklon . . .

La *japana* eldono de PACO per abunda materialo vekas intereson kaj informas pri aktualaj problemoj de laborantaj *patrinoj* kaj de *vartejo* por lernantoj. Priatentu, kara legonto de tiu ĉi nepre studinda revuo-numero: pri la laste menciita temo *per E-o* estis el 20 landoj sintezitaj la indikoj kaj konkludoj, kiuj ŝajnas ne neglektindaj de homoj agemaj favore al situacio de infanoj. *Kido matafi* lanĉas iom novan Esperantologian problemon, recenzante Kalevipoeg, tradukon de *Hilda Dresen.* Temas pri vortkunmetoj laŭ Eŭropaj tradicioj naciaj, kiuj, ankaŭ pro alispecaj vivkutimoj, ne facile aŭ tute ne estas sen helpo kompreneblaj por orientanoj. Mi rapide aldonas, ke Kido trovas laŭdojn al la poetino Dresen ĝuste tial, ĉar ŝi, kreeme manipulis la artan lingvon kaj sukcesis maksimume eviti nekompreneblaĵojn. Nu, la temo ankorau meritas pli multe da spaco, ankaŭ da penoj de esperantistaj aŭtoroj.

Ervin Fenyvesi

Noémi Tavaszy: Vitralo de Hercegovino (Jugoslavio)

Legendo de Nedec (Pollando)

La internacia lingvo de l'belartoj

Estas feliĉa homo Noémi *Tavaszy,* ĉar ŝi konservis multon el la infanaĝo: scivolemon, ne malpliiĝantan pasion vidi kaj scii ĉion, percepti kaj malkovri la tutan mondon. Feliĉa homo estas Noémi Tavaszi ankaŭ tial, ĉar ŝi havas talenton por belarto, do, kiel grafikisto, pentristo ŝi kapablas esprimi, reprodukti siajn travivaĵojn sen perantoj, sen tradukistoj kaj interpretistoj. Tial povis plaĉi ŝiaj grafikaĵoj en tiuj najbaraj landoj, en Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio kaj Pollando, kiujn ŝi vizitis multfoje dum la pasintaj jaroj, kaj tial ni komprenas ilin ankaŭ ni, hungaroj, vidinte ĉi tiujn bildojn en la Budapeŝtaj kulturaj institutoj de la menciitaj landoj. Tial vere ŝiaj koloraj monotipioj ne bezonas miajn malfermantajn vortojn, eble eĉ la orientaj frazoj de Tavaszy ne necesos pri la tre interesa, individua metodo, kiel ŝi faris kolorajn ole-monotipiojn.

Mi ne scias, ĉu ankaŭ vi pensadis jam pri tio: kial mal feliĉo estas, ke en la malnova, biblia sceno, ĉe la turo de Babelo Dio konfuzis la unuecan lingvon de l' homaro, farante per unu gesto, ordono multlingvecon? ! Kiel feliĉa estas tamen la homaro, ke la kolera Dio tiam ne tuŝis la tutan komunikan sistemon de la homoj, kaj ili povas labori kaj verki senĝene en diversaj branĉoj de la arto (escepte en la literaturo, bedaŭrinde!) kaj en la sciencoj, ĉar ili ĉiuj havas internacian signo-sistemon. Se nun vi vidos kaj studados la monotipiojn de Tavaszy, kiujn ŝi faris al noveloj, romanoj, poemoj de eminentaj poetoj, verkistoj de la pola literaturo, al la verkoj de *Mickiewicz, Sienkiewicz, Reymont, Stanislaw Lem,* vi komprenos perfekte ĉi tiujn ilustraĵojn, ĉar artisto Tavaszy povis esprimi siajn travivaĵojn, kolektitajn en polaj vilaĝoj kaj urboj, inter poloj, ĉar ŝi uzas la internacian signo-sistemon de la belarto.

Mi tre ĝojas, ke dank' al la estraro de la Pola Kultura Instituto en Budapeŝto, hodiaŭ vespere post la inaŭguro de la ekspozicio, ni povos renkontiĝi kun pola verkisto, tradukisto, Tadeusz *Fangrat;* sed el liaj poemoj, aforismoj ni ne komprenus eĉ unu vorton, se ne helpus al li hungara tradukisto, György *Radó.*

Mi opinias, ke lanĉi ĉi tiun penson ĝuste hodiaŭ vespere ne estis sen utilo. Dankon pro via atento.

Mihály *Gergely*

**Parolado prononcita en Budapeŝto, 1978. 03. 22., okaze de la malfermo de ekspozicio el koloraj monotipioj de N. Tavaszy. Ĉi tie ni prezentas kelkajn ŝiajn gravuraĵojn, kiuj pli bone efikas en nigre-blanka prezento.*

Gotiko el Levoĉa (Ĉeĥoslovakio)

La ekonomiaj solvoj estas tutmonde serĉataj
en la tereno de la telekomunika tekniko
La telefonaj instalaĵoj havas
grandan kaj gravan rolon.
Ili ebligas la plej rapidan informŝanĝon kaj
plifaciligas la urĝajn decidojn.

Tipo QA 96 estas precipe ekonomia telefoninstalaĵo,
evoluigita de Komunikteknika Entrepreno BHG.

La kompleksoj kaj aranĝaĵoj estas lokigitaj en bonaspekta, modernforma ŝranko.
La konstruo de la ŝranko ebligas enlokigon kaj konekton de la akcesoraj aparatoj.
La senbrue funkciata subcentralo estas muntebla en normala oficejo, ĉar ĝi ne bezonas specialajn kondiĉojn koncerne la ĉirkaŭaĵon.





La moderne, alloge konstruita klavŝaltilaro estas facile trarigardebla. La ĉi tie lokigitaj lampo-panelo pri okupiteco kaj blokiteco, manipulatora impulsdonilo por ekster-subcentralaj vokoj, datumeniga ebleco en la centron kaj indiko pere de la klavŝaltilaro pro la centro-difektiĝo, ktp. — garantias la efikan manipuladan laboron kaj plifaciligon de la konservado.

Fabrikas:

BHG Komunikteknika Entrepreno
1509 Budapest Pf.: 2.
Telefono: 453-300
Telekso: 22—5933

Eksportas:

BUDAVOX

Mediprotektado en Hungario

Registara agado en servo de la medioprotektado de akvo

D–ro Ferenc László

En lastaj tempoj ĉie en la mondo disvastiĝis la strebagado de la homaro restarigi la naturan ekvilibron, perturbitan de la teknika akceliĝo. Grava tereno de tiu luktado estas la ŝirmado de la akvoj, de ties kvalitoj.

En nia erao jam iĝis giganta la polucio de la maroj, riveroj, lagoj, kio estas tre maltrankviliga. Unu el la plej gravaj elementoj de nia ekzisto estas danĝerigata: eble neniu naturfaktoro penetras tiel en la ĉiutagan vivon, kiel la akvo. Ne sufiĉas eĉ la ega akvomaso (1,3 miliardoj km^3) de la Tero, se nur 0,5 % da ĝi estas la senpere utiligebla dolĉa akvo, kies signifa parto jam poluiĝis. La malpuriĝo modifas la vivularon de akvo, sekve ankaŭ la homan medion en ĉiu senco.

En tiu tempo, kiam la homdevena malpuriĝo atinginta la akvojn ankoraŭ ne transpaŝis certan mezuron, la akvokvalito ne kaŭzis zorgojn. La atenton alvokis la plimultiĝo de la loĝantaro, ĝia aglomeriĝo en urboj, la koncentriĝo de la kloakakvoj, kaj la apero de la grandaj epidemioj. La tiamaj fortostreĉoj, celintaj venki la akvooriginajn epidemiojn, direktiĝis cefe al akiro de trinkakvo, al plibonigo de higienaj cirkonstancoj, al desinfektado de akvo, kaj malpli al lokigo kaj purigo de kloakakvoj.

La organizita ŝirmado de akvokvalito disvolviĝis samtempe kun la amasa malpuriĝo de la akvoj. La formiĝo de granda industrio, la evoluo de urboj, la radikalaj ŝanĝoj de la vivocirkonstancoj rezultis impetan kreskon kaj de la akvouzado, kaj de la poluakvoj.

En la periodo de la industria ekprospero la akvokvalitŝirmado leviĝis en la centron de la akvomastrumado. Hodiaŭ la akvokvalit-ŝirmado jam fariĝis fokusa problemo de nia epoko. La ega socia bezono por ŝirmi la akvokvaliton estas do kompleksa postulato pro la subita kresko de la industria produktado kaj pro la alformiĝo de la homaj cirkonstancoj.

Apud la teknikaj kaj ekonomiaj rimedoj, ankaŭ la ŝtata agado havas sian gravan rolon: per tiuj strebas la homaro por restarigi la naturan ekvilibron perturbitan pro la multaj misaj enmiksiĝoj, same kiel en aliaj sferoj de la medioprotektado. En la akvomastrumado cetere la ŝtata interveno havas jam historiajn tradiciojn en la tuta mondo.

En la pasinta jarcento la tiamaj industriaj landoj – Anglio, Francio, Germanio, Svisio, Belgio k.a. – sinsekve eldonis dekretojn por ŝirmi la akvokvaliton. En Anglio en 1866 oni kreis komisionon *(Rivers Pollution Commision)* pri riverpolucio, kaj en 1876 ankaŭ leĝon pri akvoŝirmado. Ankaŭ la cara Rusio protektis per leĝaj sankcioj la akvokvaliton. Caro Petro la I-a (1719) ordonis puni per knutado aŭ ekzilo al Siberio tiun, kiu malpurigas per balaaĵo aŭ alia malpuraĵo la riveron *Neva.* Poste la Ruslanda kriminala kodo preskribas areston de 7 tagoj ĝis 3 monatoj kaj monpunon ĝis 900 rubloj por la malpurigantoj de akvoj.

Ankaŭ en Hungario la leĝoj kaj dekretoj pri hidrologiaj, higienaj k.s. aferoj preskaŭ senescepte protektis ankaŭ la akvojn. Ekzemple la Xa leĝo en 1840 malpermesis:

„. . . en kuŝujojn de la akvoj aŭ kanaloj alporti teron aŭ sterkon, rui kanabon – tio estas punota je 100 forinta monpago aŭ unumonata aresto . . ."

Same rigore la XXIIIa leĝo en 1885 emfazis: „estas malpermesite infekti la akvojn per nocivaj materioj. La instancoj disponu konsiderante la postulaĵojn de publika higieno, kaj la ekzistantajn kutimojn pri la disponoj necesaj, por ke el fabrikoj, minejoj kaj aliaj entreprenoj la defalaĵoj kaj infektitaj akvoj ne estu enlaseblaj en aliajn akvojn."

Kompare al pli fruaj tempoj nuntempe grave etendiĝis la agosfero de la disponoj, celantaj ŝirmi la akvojn.

En Hungarlando la nunan akvokvalit-ŝirmadon fundamentis registrara dekreto en 1961. De tiam pluraj reguloj plifortigis la efikecon de tiu ŝirmado, krome oni evoluigis tiucelan organizajon.

Precipe grava estas la nova leĝo (1976) pri protektado de la homa medio, ĉar ĝi metis la tutan homan medion komplekse sub juran protekton.

La juraj normoj pri akvokvalito, kune kun la pagendaj kromkotizoj pro uzo de akvokontingento kaj la akvotarifoj, kreas, pere de ekonomiaj efikoj, regulantan sistemon, kiu instigas ŝirmi la kvaliton kaj kvanton de la akvoj.

Je la demando, kiuj estas la kaŭzoj de tia sistemigo pere de ŝtataj disponoj ŝirmi la akvojn, konvinke klarigas la sekvaj:

La esenca rolo de la akvo por la homaj vivkondiĉoj kaj ties kontentigo ĉiam estis grava afero de la socio, kaj definitive efikis je le produktado kaj lokiĝado de la popolo. La socia graveco de enmiksiĝoj en la naturajn akvocirkonstancojn estas des pli granda kaj determina, ju pli grandan transformadon bezonas la natura medio por la homaj pretendoj – respektive, ju pli da protektado ĝi bezonas kontraŭ la difektiĝoj far la homa agado.

Pro la kresko de la loĝantaro, vivnivelo kaj industrio, pro la pli intensaj metodoj en la agrokulturo, la medioprotektado ricevis pliiĝantajn taskojn koncerne la akvomastrumadon. La medioprotektada tasko havas tial esence duoblan projekcion:

– reguligo kaj transformado de la naturaj akvocirkonstancoj, konforme al la sociaj bezonoj kaj al la natura medio;

– ŝirmado de akvomasoj kontraŭ polucio, kontraŭ mediaj nocoj.

Konstruado de inunda help-rezervujo de *Mérges,* proksime al Győr

La defendo kaj plibonigo de la akvo-kvalito, kaj la neceso ke la akvo estu je dispono en konvena kvalito, estas tiaj taskoj de la akvomastrumado, kiuj nuntempe iĝis rekonitaj bezonoj de la socio. Ties graveco nepre pliiĝos en la futuro.

Por la akvomastrumado aperas ankaŭ novaj vidpunktoj, ĉar al la socia bonfarto hodiaŭ estas jam nemalhaveblaj la apudakva aŭ perakva refreŝiĝo, ripozado, sporto; bezonataj faktoroj por renovigi la laborkapablon de la laboruloj.

Surbaze de la menciitaj, oni povas diri, ke neniu natura faktoro tiel penetris la ĉiutagan vivon, la mastrumadon, kiel la

Akvorezervujo en *Somogyapáti* (Sudhungario)

akvo. Tiu naturtrezoro prezentiĝas samtempe kiel vivkondiĉo, nutraĵo, materialo, produktaĵo, energio-fonto kaj en multaj kazoj saniga faktoro.

Bedaŭrinde tiu gravega trezoro estas pli kaj pli minacata, ĉar, pro sia cirkulado en la naturo, ĝi povas poluiĝi pli grandmezure ol la aliaj medio-elementoj, kaj tial peri medionocigajn materiojn. La poluciaj materioj, enigitaj en akvomedio, danĝerigas la vivkondiĉojn de la homo kaj de la animalaro. Pere aŭ senpere, la dezirita kvalito de la homa medio troviĝas en danĝero:

– La evoluo de la industrio kreskigas la danĝeron de poluo-nocoj kaj kvante kaj kvalite.

– La granduzina agrikultura produktado kaj kemiizado, la etaj kaj akcesoraj uzinoj, prilaborantaj la agrokulturajn produktaĵojn, konsiderinde ampleksigis kaj plivastigis la fontojn de la poluciado.

– La evoluo de industriaj krudmaterialoj, agrikulturaj teknologioj kaj konsum-bezonoj de la loĝantaro estas ligitaj al novaj materialoj, sekve kun danĝero de poluadoj nekonitaj ĝis nun, kaj foje eĉ ne antaŭvideblaj.

Bedaŭrinde, sed ne eviteble akompanas la produktadon kaj konsumadon nezorgemo, foje elementa plago, kiuj povas estigi dum mallonga tempo eksterordinare danĝeran polucion en la akvo-medio.

La reciprokaj efikoj de la diversaj poluadoj (aero-, akvo-, grundo- ktp. malpuriĝo) forte komplikis ties kompleksan preventadon.

Ne nur la kvanta kreskado de la poluantaj materioj misas la akvojn. Ankaŭ ties kvalitoj kompare al antaŭaj statoj forte malhelpas la kapablon je mempurigado en niaj akvofluoj.

Akvopurigejo en *Balmazújudvar* (Orienthungario)

Tiudirekte gravan rolon havas la petrolo, resp. ties derivaĵoj, kiuj tegas la akvosurfacon kvazaŭ membrano kaj tiel izolas ĝin de la aero. En la fluejo ili okazigas konstantan sedimentadon. La oleeca ŝlimo, elmergota dum la akvopurigado, nocas ankaŭ al la vegetaĵo. De tie la pluvoj ensorbigas ĝin en la grundon, kie ĝi plupoluas la subterajn akvojn. Pli kaj pli malhelpas la sinpurigon la permetalaj defalaĵoj, devenantaj el fabrikoj, kaj la novtipaj detergentaj laviloj, anstataŭantaj nun en la mastrumaj kloakakvoj la biologie favorajn sapo-restaĵojn.

El la menciitaj eblas konkludi, ke por deflankigi la minacojn for de la akvoj necesas multflankaj, ekonomiaj, registaraj disponoj en pluraj direktoj. Sole ties kompleksa pritraktado povas alporti la deziratan rezulton por la socio.

En la akvomedio-ŝirmado ricevas grandan rolon la ŝtataj organoj, akvoaferaj instancoj por la anticipado kaj la riparado de la okazintaj jam damaĝoj. Tiuj instancoj devas konsideri, ke la

Bor-establaĵo



modernaj taskoj de akvomedio-protektado estas plenumeblaj nur per pli sistemeca akvomastrumado, per pli efika alproksimigo de la diversaj interesosferoj. Tiu laboro bezonas ampleksajn informojn, fakajn kaj tre konsciencan konsideradon. Ĝustajn decidojn eblas fari nur surbaze de kompleksaj esploroj, de konsidero de la interrilatoj. Oni devas atenti kvazaŭ kompason, ke la materiaj kaj biologiaj specifecoj de la akvo-cirkulado, la kresko de la sociaj, teknikaj, ekonomiaj pretendoj, la relative malgranda kvanto kaj danĝerita kvalito de la dolĉakvoj postulas multe. Tiel en uzado, manipulado kaj prizorgado de la akvohavaĵo la sekvantaj postulaĵoj devas realiĝi:

– la akvokonstruado kreskigu, sed ne malkreskigu la efikecon de la natura mekanismo kontraŭ la detrua efiko de la akvo, servante ankaŭ por rezervi ties kvalitojn;

– antaŭ ol decidi pri kunigo de akvosistemoj, oni devas pesi la ekologiajn konsekvencojn, por elimini eventualajn nocajn efikojn;

– antaŭ la akvoordigo (kanalizo) de la riveroj nepre okazu ankaŭ ekologiaj kaj hidrobiologiaj konsideroj.

Ju pli grandmezura interveno estiĝas je la originalaj rilatoj de akvomastrumado, des pli vasta kaj radikala ekologia esploro devas antaŭi la studprojektojn, respektive la preparon de la decido;

– la metodo kaj la teknika aparato por konstruado de la bordo kaj fluejo pleje servu la sinpurigan kapablon de la akvo;

Poluakvo-puriga establejo – proksime al urbo Baja

– koncerne la lagojn, rezervejojn, akvofluojn estu instalita sistemo de la fizika-kemia akvokvalit-kontrolado, kaj en la inspekta organizaĵo ankaŭ la biologia kontrola sistemo. Tio povas disponigi fidindajn indikojn pri ŝanĝiĝo de konsisto de l' akvaj organismoj, de la faŭno-flaŭro, eĉ pri akumulado de pezaj metaloj kaj pri ceteraj malutilaj procezoj en la akvo, akvaj kreskaĵoj kaj ŝlimo;

– oni devas celi la ekvilibron inter la disponebla akvokvanto kaj la akvobezono, eĉ per redukto de akvopretendoj, unuparte per pli ŝparemaj akvo-teknologioj, aliparte per pluroblaj akvo-utiligoj. Ĉi lastan oni devas atingi parte per akvocirkulado en la uzinoj, aliparte per sistema lokigo de la diversaj akvouzantoj preter la akvofluoj;

Lago *Abaliget* en montaro *Mecsek* proksime al *Pécs*

– estas grava teknika tasko levi la efikecon de puriginstalaĵoj, kaj per tio la eblon por plurfoja utiligo.

La instancoj zorgantaj pri la medioprotektado en la menciitaj taskoj devas respekti la bazajn principojn de nia mediopolitiko.

Unu el la plej gravaj estas la principo: la medioprotektado devas esti agordita al la ekonomia evoluigo. Tio estas precipe emfazinda, ĉar en kapitalismaj landoj disvastiĝis opinioj, ke sola ebla vojo solvi la mediokrizon estas la radikala limigo de la ekonomia kreskado.

Por la socialismaj landoj tiu alternativo estas neakceptebla. Ni tute ne volas subtaksi la realajn danĝerojn de la mediopoluado. Rekonante ties realecon ni tamen asertas, ke la socialisma socia sistemo, dank' al la socia posedo de la produktiloj kaj al la ŝtata direktado de la ekonomio, donas realan bazon por estigi harmonion inter la kreskanta bonstato de la loĝantaro kaj la medioprotektado. Oni devas konscii, ke ĉi-rilate tute ne ekzistas iaspeca aŭtomatismo; la socialisma socia sistemo per si mem ne estas garantiaĵo kontraŭ la mediopoluado: por deflankigi ĝin estas necesa agordita organizado de la ŝtataj kaj de la akvoaferaj instancoj.

Solvi la multflankan problemaron de akvopolucio estas ja strikte ligita al la ekonomia politiko. Unu el la bazaj farendaĵoj estas la kreo de tutlanda unueca sistemo de la mediprotektado-planado. Kvankam nek tio, nek ties jura reguligo estas ankoraŭ tute solvitaj, jam staras je dispono ĉi-rilate certaj spertoj: en la akvoafera servo jam plu frue pretiĝis regionaj planoj pri akvokvalitŝirmado. Por ilin plenumi – harmonie kun la teritoriaj ekonomiaj planoj – necesas celkonscia organizado kaj juraplikado. Ĉi tiuj duspecaj agadoj devas kuniĝi ĉe la akvoaferaj instancoj. La planojn apenaŭ povus plenumi la akvo-aferaj

Irigaciado per la irigaci-branĉaro en Kalocsa

instancoj, se ili nur senage atendus, ĝis la tieaj uzinoj decidos establi puriginstalaĵojn kaj ekfaros ties projektojn. Nur tia sinteno de instanco estas konforma al la nunaj postuloj, kiu ne atendas la sinanoncon de la klientoj, sed daŭre registras sur landkarto la poluantajn uzinojn, organizas, eĉ helpas ĉe tiuj la konstruadon de puriginstalaĵoj, kaj tiucele plene aplikas la disponeblajn jurajn rimedojn.

Konsiderinda principo de la juraplikado por medioprotektado estas la anticipado. En ties fono troviĝas la simpla rekono, ke preventi estas grave ne nur el vidpunkto de homa sano, sed ankaŭ ĉar tio pli malkaras ol purigi la jam poluitan medion. La signifon de tiu principo eĉ pliigas, ke la polucio naskas neripareblajn pluroblajn damaĝojn, kies likvido ne estas nur financa afero. Cetere la konsekvenca anticipado estas eksterordinare malfacila, ĉar oni devas konscii, ke ĉirilate interpuŝiĝas multaj kontraŭaj interesoj.

La ŝtata administrado staras en servo de la anticipado unuavice pere de magistrataj permesoj, do per juraplikaj rimedoj. El inter tiuj elleviĝas la akvojuraj procedoj pri permesoj de investaĵoj. Ĝenerale al tiuj instancoj transŝoviĝas la rolo selekti tiujn konstruadojn, kiuj influus malfavore la kvaliton de la akvoj, por tiel validigi la ŝirmcelajn preskribojn.

Koncerne la anticipadon, oni devas paroli pri deflankigo de eksterordinaraj mediaj danĝersituacioj, kaj pri tasko- kaj agosferoj de la ŝtataj organoj. Kaj internaciaj, kaj enlandaj spertoj pruvas, ke tiaj eksterordinaraj danĝersituacioj – ĉefe pro akvopolucio – estas akompanantoj de la teknika evoluo, kiujn oni povas ja malkreskigi (ekz. per senĉesa kontrolado, anticipa riparo), tamen plene elimini ilin praktike ne eblas.

Niaj kompetentaj ŝtataj organoj devas sin pretigi do al antaŭvideblaj danĝersituacioj (ekz. rompiĝo de oleokondukilo) preparante eksterordinarajn disponojn por minimumigi damaĝojn. Niaj novaj jurreguloj jam kalkulas per tiaj eksterordinaraj situacioj, kaj donas certajn – kvankam ne ĉiam konvenajn – rajtigojn al la ŝtataj organoj.

Grava principo de nia medioprotektado-politiko estas la progresiveco, manifestanta sin plurmaniere. Ĉar la popolekonomio ebligas nek ĉe ni, nek en aliaj landoj likvidi la mediopolucion per unufoja aŭ rapidritma kampanjo, estas necesa la daŭra, strategie prilaborita agado. La progresiveco do signifas, ke

a) la disponeblajn rimedojn oni koncentras por ĉesigi la plej danĝerajn poluadfontojn, kaj samtempe por malhelpi plian polucion, novajn poluadfontojn;

b) sur kelkaj preferataj regionoj (ĉirkaŭaĵo de lagoj Balatono kaj Velencei k.a.) oni faras altefikajn disponojn, dum aliloke oni celas nur, ke almenaŭ ne malboniĝu la ekzistanta polucio-nivelo, resp. malpliiĝu ties kreskado.

Konforme al tio la progresiveco validiĝas ankaŭ en la oficiala jurpraktiko de mediprotektado. La oficialan kontrolon necesas komenci ĉe la plej danĝeraj, mediopoluantaj uzinoj kaj igi ĝin sistema. Tipa estas la progresiveco, kiu karakterizas la punpagojn pro poluakvoj kaj pro poluado de kanaloj, t.e. ke la monpuno progresive kreskanta devas igi la uzinojn je ĉesigo de la noca poluado. La progresiveco manifestiĝas ankaŭ tiel, ke la jurreguloj plej ofte indulgas provizore la malpurigantojn por tiu celo.

Estas organika parto de nia mediprotekta politiko, ke la ŝtato ne nur malpermesas, preskribas kaj sankcias, sed ankaŭ helpas multflanke uzinojn por ĉesigi la damaĝon poluadon. La principo de ŝtata apogo montriĝas ankaŭ en la – tiucela – malpliigo de punpago.

Niaj jurnormoj rilate tiujn monpunojn favoras, se la poluanta uzino komencas establigi puriginstalaĵojn kaj tion plenumas kontinue. Le celo de tiu favorado estas: eviti, ke la punpago forprenu de la uzino tiujn financajn rimedojn, kiujn ĝi utiligus ĝuste por konstrui la puriginstalaĵojn. La restanta puno instigos la uzinon rapide finfari la konstruadon kaj per tio liberiĝi el sub la monpuno.

La subteno por investado konstrui puriginstalaĵojn estas la plej signifa formo de la ŝtata apogo; ĝi havas finance plurajn

Akvopumpil-establaĵo en *Szeghalom*





Premcentralo de irigaci-branĉaro en *Hajdúnánás* (Orienthungario)

fontojn. La plej grava el tiuj estas la Hidrologia Fondaĵo, kaj la Fondaĵo por Medioprotektado. La kompetentaj ŝtataj organoj decidas pri utiligo de tiuj fondaĵoj – parte laŭ konkursa sistemo. Ĉe la prijuĝo de subteno-petoj oni konsideras la celojn konekse kun la principo de progresiveco.

Parto de la medioprotektaj elspezoj ŝarĝas nerekte aŭ senpere ankaŭ la loĝantaron. Ne estas do indiferente, kian rolon surprenas la ŝtato en la redukto de tiuj ŝarĝoj. Laŭ la validaj jurreguloj, parton de investad-kostoj de la medioprotektado oni rajtas surŝarĝi sur la posedantojn (utiligantojn) de la koncernaj nemoveblaĵoj. Tiaj investadoj estas la konstruo de komunuma kanalo, komunuma kloakakvo-purigejo, krome la investadoj servantaj la grundoŝirmadon.

Alia formo de la ŝtata subteno estas la bankkredito donata tiucele por uzinoj, krome tiaj kotizoj k.s. per kiuj oni instigas la uzinojn konstrui puriginstalaĵojn, resp. ceterajn medioprotektadajn investadojn (ekz.: grundoŝirmadon). La lastaj metodoj estis ĝis nun malofte uzitaj.

Unu el la plej gravaj principoj de la medioprotekt politiko de kapitalismaj landoj estas la „PPP" *(polluter pays principle)*, t.e. la principo de respondeco de tiuj, kiuj kaŭzis damaĝon: per kiu ajn maniero iu ŝarĝas la medion, devas pagi la elspezojn de la medioŝarĝado. Tiu principo estus destinita por garantii, ke entrepreno, plenumanta obeeme la medioprotektadajn preskribojn kaj pro tio havanta pli da kostoj, ne troviĝu en malavantaĝa pozicio kompare al aliaj, kiuj ŝparantaj la elspezojn por medio-protektado, produktas pli malkare, ĉar ili poluas la homan medion.

En socialismaj landoj, ankaŭ en Hungarlando, la respondeco de la damaĝkaŭzanto signifas kompleksan politikan – juran respondecon. Ni emfazas precipe la politikan elementon de tiu ĉi respondeco. La nociga poluado estas ja kontraŭjura sinteno, danĝera por la socio. Sekve, paginte monpunon aŭ kompenson, la uzino, poluanta la medion, ne kvitigis sian konton favore al la socio, ne „aĉetis" la rajton por plu polui la medion. La elekto inter laŭrajta kaj kontraŭrajta sinteno en sfero de la medioprotektado ne estas temo de konsiderado, sur iaspeca ekonomia bazo. Ĝuste tial la medioprotektadon oni devas rigardi organika parto de la ekonomio, kaj trakti ĝin ĉe pritaksado de entreprenoj, kooperativoj.

Kompreneble la respondeco de la nocanto havas ankaŭ jurajn elementojn. La sistemo de respondeco estas kompleksa ankaŭ el ĉi tiu vidpunkto: ĝi entenas elementojn de la ŝtat-administrada, civila, laborafera kaj kriminala juroj.

Laŭ tempo kaj praktika signifo la unua elemento de la ŝtatadministrada jura respondeco estas la puno pro akvopoluado, kiun sekvis ekde 1971 la monpuno pro poluo de kanaloj. Nia punpagsistemo bezonas baldaŭ modernigon, evoluigon. Nome ni havas nuntempe monpunojn nur pro kelkaj medionocaj kondutoj, sed mankas sankcioj ekzemple pro grundpoluado. La nunaj rimedoj postrestis la „evoluon" de la variantoj de malpurigado. La monpuno pro poluakvo ne taŭgas okaze de averio-specaj, eksterordinaraj poluadoj, de agrokulturaj poluadoj, alvenantaj en kolektejojn de precipitaĵoj. Same ne eblas konvene puni pro akvopolucio far ŝipoj, nek pro poluo de grundakvo. Konsidere al tio, en 1976 la registaro preskribis etendi la mediprotektan punprocedon al sferoj nereguligitaj ĝis nun.

Tersurfaca akvopuriĝa establaĵo de tipo DEVIG en *Balatonfüred*

Ĉe mediopoluantaj kondutoj ofte eblas konstati ankaŭ personan respondecon – intencan malobservon de medioprotektaj preskriboj, aŭ nezorgemon – kaj tial, krom la sankcio punanta la entreprenon necesus pli grandmezure lanĉi la individuan respondecon. Tio povas okazi en la proceduro pro jurnorma kulpo, aŭ tiamaniere, ke oni metas sur la respondeculon iom de la tuta monpuno, laŭ reguloj de la laborafera juro.

Povas ŝajni, ke la efektivigo de la civila, resp. kriminaljura respondeco ne estas tasko de la administraj organoj. Tamen ilia agado implikas tiun, ja sen ilia aktiva partopreno ofte ne eblus konstati la personojn kaŭzintajn la damaĝon. Ĉe la ĝisnunaj damaĝoj, okazintaj per akvopolucio, la kompetentaj organoj ofte malkaŝis la nocanton per rapida surloka kontrolo, uzante modernajn instrumentojn. (Sen tio eĉ ne eblus iniciati la procedon.) Tiaspecajn kunlaborojn igos necasaj la medioprotekta leĝo dum kriminal-juraj procedoj.

Akvoŝveliga digokluzo ĉe *Köröslادány*



Laŭ konstato de la Fina Akto de Konferenco pri la Eŭropa Sekureco en Helsinki: „mediopolitiko povas esti sukcesa nur tiam, se la protektadon kaj plibonigon de la medio ĉiu grupo de la loĝantaro kaj ĉiuj sociaj fortoj akcelas, konsciante sian respondecon, kio bezonas kontinuan kaj profundan klarigan laboron, precipe inter la junularo". Harmonie kun tio, unu el bazaj trajtoj de nia politiko pri medioprotektado estas la invito al la civitanoj por kunlabori.

En nia lando la loĝantaro dekomence montriĝis helpanto al la fakaj aŭtoritatoj. Unue estis kreitaj departementaj akvoŝirmado-komitatoj, en kiuj partoprenis ankaŭ reprezentantoj de sociaj organizaĵoj kaj fakuloj de kompetentaj sekcioj. Ili ne nur helpis per analizoj de la situacioj kaj per proponoj, ankaŭ realigis observadon pere de vasta aktivularo por ŝirmi la akvokvaliton kaj donis efikan helpon, ĉefe per rapida konstato kaj anonco pri la eksterordinaraj akvopolucioj. Jam antaŭ la medioprotekta leĝo, la departementajn komitatojn de naturprotektado, resp. de aerpureco-ŝirmado, oni laŭjure postenigis apud la departementaj konsilioj, kiel konsilodonajn organojn.

Ĝenerale la Patriota Popolfronto, resp. la Medioprotekta Komitato de la Ligo de Teknikaj kaj Sciencaj Asocioj akordigas la medioprotektan laboron de la diversaj ŝtataj kaj sociaj organoj. Ĉirilate la plej vasta agadprogramo disvolviĝis enkadre de la Patriota Popolfronto.

Ĉiu kondiĉo estas tiel donita, ke la atento kaj aktiveco de la publiko ne sur sekvu la eventojn, sed ĝi ŝanĝiĝu baldaŭ al agoj.

La aŭtoritatoj povas esti ververe sukcesaj nur tiam, se ili havas kompreneman, plenefikan subtenon de la socio.

(Tradukis Tivadar *Kiss*)

recenzoj - recenzoj

Riĉa antologio de malgranda popolo

„Unu el la plej tipaj karakterizaĵoj de ĉiu nacio estas ĝia literaturo. La literaturo respegulas la karakteron de la naciaj folkloro, historio kaj kulturo, do tion, per kio la nacio vivas, por kio ĝi luktas, kien ĝi direktiĝas; la literaturo refreŝigas ĝiajn fortojn kaj kapablojn." – skribas en la antaŭparolo Jozef Veľký, la elektinto de la materialo por la Slovaka Antologio. La evidentan pravecon de tiuj ĉi vortoj oni ne povas kontesti. Kaj tuj anoncas sin la demando: ĉu la jena antologio estas fidela spegulo de la slovaka literaturo? Ĉu ni povas per ĝia helpo trarigardi la ĝisnunan vojon kaj la elektitan direkton de tiu ĉi popolo?

Ni povas konstati, ke esence jes. Slovaka Antologio estas malgranda literaturhistorio kun elektitaj montrospecoj de literaturaĵoj, kiu celas prezenti la literaturon de la slovaka nacio ekde la komencoj ĝis la nuntempo. Kvankam la unueca slovaka literatura lingvo estas ĉ. unu kaj duonjarcenta, la popolo mem anoncis sian ekziston jam antaŭ pli ol mil jaroj. Foliumante la volumon, la leganto povas esti historia atestanto de tio, kiamaniere la slovaka popolo ekformas sian literaturan lingvon, kiu fariĝas ilo por esprimi la plej karakterizan senton de la nacio: la senĉesan sopiron al la libereco.

La vojo ne estis facila: post la malnovslavaj lingvaj rememoraĵoj la mezepoka slovaka literaturo sonas latine, kaj pli poste (inter la 16-a kaj 18-a jarcento) regas la ĉeĥa, aŭ la slovakigita ĉeĥa lingvo. Kaj ni ne forgesu la influon de la hungara – la historiaj kialoj estas konataj – kaj samtempe de la germana lingvoj. Sed finfine, kiel unu el la rezultoj de la klopodoj de la slovaka reform-epoko (unua parto de la 19-a jarcento) estiĝis tiu lingvo, per kies helpo la slovaka literaturo fariĝis vivanta parto de la mondliteraturo.

La kompilintoj de la antologio klopodis kiel eble plej amplekse prezenti la riĉecon de la slovaka literaturo. (Ĉirkaŭ 90 verkistoj kaj poetoj sur 500 paĝoj!) Sed tiu ĉi klopodo kaŭzis, ke la plej elstaraj personecoj ricevis saman lokon (laŭ la kvanto de la prezentitaj verkoj) kiel la duarangaj. Ni ne bezonas klopodi serĉi la ekzemplojn. Plej okulfrape estas, ke Pavol Országh-Hviezdoslav partoprenas kun unu poemo kaj kun fragmento el longa poemo. Tamen pri li ni povas legi: *„Per la dimensioj de sia talento kaj de sia verko li superas ĉiujn alinjojn. Ĝis hodiaŭ li estas la plej respektata slovaka poeto, kies kreitaĵoj estas kompareblaj kun la plej altaj artaj valoroj de alinaciaj literaturoj."* Nu, el la menciitaj dimensioj oni ne tre multe montras al ni. Simile malmulte ni povas legi de Ľudovít Štúr, kaj – tamen iom pli – de Laco Novomeský, kiuj ankaŭ estis grandio-



zaj personecoj de la slovaka literaturo. Samtempe okupas ok plenajn paĝojn ekzemple unu banala novelo de Ján Hrušovský. Tiu ĉi perdo de la proporcieco estas iom nekomprenebla.

Por la hungaraj legantoj estas speciale interese renkonti en la antologio literaturistojn, kiuj estas konataj ankaŭ el la hungara literaturhistorio, kiuj uzis en siaj verkoj ambaŭ lingvojn, aŭ la latinan. Ni menciu nur unu nomon: tiun de la polihistoro de la baroka periodo, Matej Bel. Li kaj aliuloj jam antaŭ jarcentoj – konscie aŭ nekonscie – laboris por la amikeco de niaj popoloj.

Kaj ni povas konstati ankaŭ tion, ke la plej grandaj slovakaj poetoj ĉiam estis en vigla kontakto kun la hungaraj. Janko Kráľ estis persona amiko de Petőfi, preparis sin por la advokata ekzameno kune kun Jókai; Pavol Országh-Hviezdoslav tradukis la verkojn de Arany, Petőfi kaj Madách, kaj entuziasme salutis Ady-n. Ni povas daŭrigi la vicon per la samtempuloj: la antaŭnelonge forpasintaj Laco Novomeský kaj Valentin Beniak estis konataj ankaŭ kiel elstaraj tradukistoj el la hungara. Vivas kaj laboras en Bratislava la poetoj Ján Smrek kaj Emil Boleslav Lukáč, nestoroj de la slovaka literaturo, kies tradukista agado estis rekonita per la memormedalo de la Hungara Pen Club.

Granda entrepreno, prezentita per la Slovaka Antologio bezonis kunlaboron de la plej eminentaj slovakaj kaj ĉeĥaj tradukistoj: Jiří Kořinek, Miloš Lukáš, Pavel Rosa, Štefan R. Seemann, Magda Šaturová-Seppová (kiu estas samtempe ankaŭ la redaktorino de la antologio), Eduard V. Tvarožek, Ján Valašťan-Dolinský. Ili plenumis rekonindan laboron. Bedaŭrinde, ili ne ĉiam sukcesis trovi tiun poeton, verkiston, aŭ la verkon, kiu estas la plej proksima al ili. Tiamaniere – precipe en la nuntempa parto de la antologio – estas trovebla iom da monotoneco. Malgraŭ tio, Slovaka Antologio gajnas eminentan lokon en la esperantigita literaturo. Ĝian aperon ni povas saluti kun ĝojo kaj gratulo. (Slovenské pedagogické nakladeľstvo, Bratislava, 1977.)

Éva *Tófalvi*

ŜATINDA LIBRO

F. V. Dorno: La aventuroj de L.R.M. Stultulof la X-a – Levu la manojn! Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1977. 140 p., 19 cm. Prezo: 12,– ned. gld.

La libro estas represo de du apartaj verkoj, publikigitaj respektive en Belgujo kaj ĉe „Literatura Mondo" en 1939.

Konstateble represoj de elĉerpitaj verkoj ĝuas lastatempe furoran renesancon. Principe mi ne tro inklinas laŭdsaluti reeldonojn, krom, kompreneble, kiam temas pri nepre nemalhaveblaj elstaraĵoj. Mi ja pensas kun iom da angoro, kiom da valoraj manuskriptoj kuŝas senespere en la ŝvelaj tekoj de pluraj nuntempaj talentuloj. Kaj muzeaĵojn mi ne tro aprecas.

Tamen la legado de tiu ĉi libro igis min parte modifi mian antaŭjuĝan vidpunkton. Do, tre verŝajne pravas tiuj, kiuj plendetas, ke nia libromerkato konsistas plejparte el verkoj klasifikeblaj ĉe du ekstremoj. Unuflanke troviĝas troabundo da libroj tute nenecesaj kaj ofte eĉ fuŝaj, ĉu aperigitaj nur por kontentigi la ambiciojn de tromemtaksantoj, ĉu konsistantaj el tre malnovaj verkoj enbretigitaj senlege, ĉar aĉetitaj nur pro afekciaj konsideroj. Aliflanke, nemalmultas verkoj ĝenerale tro pretendaj, (pseŭdo)-beletraj esoteraĵoj, legeblaj nur kun ega peno, nome, verkoj, kiujn ne estus konsilinde enmanigi al kursfinintoj, ĉar oni riskus fortimigi ilin. Inter ĉi tiuj ekstremoj malmultas la libroj, kiujn ĉiu normala legemulo povus digesti senoscede aŭ senŝvite, kun ĝuo, ĉar verkitaj en glata, korekta, ne tro ornamaĉa Esperanto, kun komprenebla kaj versimila temfadeno, finfine, libroj katalogeblaj en tiu ora meznivelo, kiu konsistigas la plej grandan procenton de la nacilingvaj libromerkatoj.

Kaj ĝuste tie ĉi lokiĝas, niatakse, ĉi tiu senpretenda sed pluraspekte ŝatinda libro.

Kiel la titolo mem komprenigas, la unua libroparto rakontas la vivrutinaĵojn de Stultulof la X-a, fantazia reĝo de Fuŝio. La satiro estas tuj evidenta, foje groteska sed foje pensiga, parodianta ne tute fikciajn



okazaĵojn (ekzemple, kiam ĝi priskribas la truke organizitan atencon al la reĝo, per kiu la ministeriaj intrigantoj povos poste falsakuzi la opoziciantojn kaj pravigi ilian ekstermon). Mi konfesas, ke dum la legado mi atendis kun ekscitiĝo la punkton, kie vera atencanto mortpafos tiun stultblufan reprezentanton de la reĝeco, sed la aŭtoro ne kontentigis min.

La dua enlibrigita peco estas teatraĵo (gaja komedio en tri aktoj, laŭ la titolo): sufiĉe movplena interplekto de kur-ritme alternantaj scenoj, kun ĉiuj ingrediencoj de la polic-detektivaj burleskaĵoj florantaj inter la du mondmilitoj. La agoj disruliĝas (ĉu vi ne divenas?) en la medio de esperantista kongreso.

Se ni konsideras, ke la tekstoj estis verkitaj proksimume antaŭ kvardek jaroj, la lingvaĵo estas kontentige flua, korekta kaj varia.

Preso, formato kaj aspekto de la libro estas plaĉaj kaj la papero tre bona, kio dementas la onidiron, ke la orienteŭropaj eldonaĵoj malbelaspektas. Preserarojn mi ne kutimas nombri, ĉar ili ne tro ĝenas mian komprenon; cetere ili estas en la libro tre malmultaj.

Aldo *di Giorgi*

Renesancaj poemoj

La renesanca periodo. Tra la parko de la franca poezio. Dulingva eldono. Enkondukoj, notoj kaj tradukoj de G. Waringhien. *Eldonis: Plejado (Italio), 1977. 205 p., 20 X 14 cm.*

„La maljuniĝantoj trovas ian plezuron en la rigardado al la juneco; eble tial mi sentas nun apartan inklinon al la poetoj de la XVIa jarcento" – skribas Waringhien en la mallonga, tamen modele orientanta enkonduka eseo. Tiu ĉi eseo scias proksimigi per malmultaj vortoj la renesancan Francujon al la nuntempa leganto, prezentante al li ne artfilozofiajn tezojn, sed konkretajn informojn pri la vivcirkonstancoj de la tiamaj homoj. Traleginte tiun enkondukan eseon eĉ neinteresita leganto eksentos scivolon pri la poezio de la epoko, kaj fakte trovos al si korproksimaj tiujn malnovajn poemojn.

En la ampleksa volumo alternas versoj de poetoj, kies verkaro apartenas al la internacia kulturtrezoro, kaj poemoj de malpli konataj bardoj. (Oni povas legi ankaŭ dekversan poemeton de Maria *Stuart,* reĝino de Skotlando.)

Plej amplekse estas reprezentataj la glora *Ronsardo,* kaj la eble malpli potenca, eble „artefarita", tamen por mi pli altira *Belajo* (Du Bellay). Apartan sekcion ricevas la epigonoj (mi preferus nomi ilin „skolanoj"), inter ili la internacie konata Luiza *Labbé.*

Ĉiun sekcion enkondukas aparta eseeto, kiu donas la necesajn informojn al la neorientita leganto.

Mi certas, ke en malmultaj lingvoj troviĝas tiel bone redaktita kaj tradukita, ne tro ampleksa, tamen esence informa antologio pri la franca renesanca poezio. Tiu ĉi libro de Waringhien krom esti agrabla legaĵo servas ankaŭ kiel utila studlibro. Ĉe serĉado por la plua vojo de nia tradukliteraturo, oni povus cerbumi pri eldono de similaj verkoj, anstataŭ traduki mondkonatajn ĉefverkojn, kiuj plejparte nur uziĝas kiel municio (ĉu efika?) por propagandistoj kaj dekoraĵo de niaj librobretoj.

V. *Benczik*

Enigmo kaj humoro

Stano Marĉek–Stano Markoviĉ: Krucenigmoj kaj humoro. Vol. I. Eld.: Esperanto klubo en Martin (Ĉeĥoslovakio), 1977. 21 X 14 cm. 53 p. Prezo por Hungario: 15,– forintoj.

Instruan amuzon promesas la ĵus aperinta libro de du slovakaj junaj esperantistoj. Oni rajtas diri: ĝi estas duoble instrua kaj amuza, ĉar montras artospecojn al la publiko, kiuj en nia literaturo – ŝajne – mankis. La enhavo: 40 krucenigmoj kaj 25 humuraj desegnaĵoj estas preparitaj kun granda zorgo kaj majstra scio. Ili servas praktike altigon de la lingvoscio de solvantoj, kiuj devas konsulti la vortarojn, eĉ leksikonojn. Tamen ĉi tiu libro naskiĝis ne nur por pasigi la enuajn horojn de soluloj, sed ankaŭ por riĉigi, vigligi la kluban vivon. La desegnisto per amardolĉa rideto primokas la homajn malperfektaĵojn, foje eĉ ŝajnigas, ke la bestoj estas pli saĝaj, pli homecaj ol la homoj mem. Sendube valora branĉo estas „verda humuro": kritiko pri „sekta samideaneco".

Ni atendas la duan volumon!

Imre Szabó

Nova renkontiĝo kun Hilda Dresen

„Estona Soveta poezio" Elekto kaj traduko de H. Dresen Eld.: „Eesti Raamat" Tallinn 1977 Prezo por Hungario: 15,– forintoj.

Dank' al la obstina Esperanta eldona aktivado en la Estona Soveta Socialisma Respubliko la estona literaturo jam estas vaste konata kaj ŝatata de la monda esperantistaro.

Antaŭ nelonge eldonejo „Eesti Raamat" en Tallinn eldonis du valorajn verkojn: la estonan nacian eposon „Kalevipoeg", tradukitan de Hilda Dresen kaj la romanon „La mastro de Kôrboja" de A. H. *Tammsaare* en traduko de Benita *Kärt.*

Nun la eldonejo „Eeesti Raamat" eldonis novan libron en Esperanto; „Estona soveta poezio", en elekto kaj traduko de Hilda *Dresen.* Tiun ĉi poemaron ni ne devas taksi kiel apartan fenomenon en la traduka estona Esperanto-literaturo.

Ankoraŭ en 1929 aperis esperantlingva elekto el poeziaĵoj de Marie *Under* („Elektitaj versaĵoj"), tradukita de Hilda Dresen. Al la nelacigebla kaj talenta plumo de H. Dresen ni ŝuldas ankaŭ la tradukon de la poemaro „Horizontoj" de Johannes Barbarus kaj la plej grandan parton de la traduka poezio en „Estona antologio" (1932).

„Estona soveta poezio" ne estas antologio, ĝi kompletigas kaj plivastigas nian horizonton al estona poezia trezorejo. Nun per tiu ĉi kolekto Hilda Dresen prezentas specimenojn el la plej nova estona poezio inter la jaroj 1940–1970. Por tiu ĉi celo ŝi elektis 36 aŭtorojn, ĉies poemoj formas riĉan gamon el problemoj, temoj kaj ideoj.



Ankoraŭ la unua poemo „Leningrad dum printempa florado" de Johannes *Barbarus* ravas per sia delikata poezia sugestio. La poeto talente animigas la urbon kaj la legantoj ne povas ne eksenti la viglan printempan spiron de Leningrad. La intima tono

Originala verko pri Spinoza

FONDITA SUR ROKO de d-ro Albert Goodheir. Eld. Kardo, Glasgow, 1977. 50 p., ofsetita. (Pri filozofio de Spinoza).

Antaŭ tri jarcentoj Nederlando, kiu liberigis sin el sub la hispana-Habsburga despoteco, alte floris ekonomie kiel unua el la burĝaj socioj. En la tiama plej libera lando la 17a jc. vidis modernigajn tendencojn en sfero de la spirito: kreiĝis centro de la Eŭropa libro-eldonado kaj presado, ekigo de la internacia juro, ideologioj favore al la burĝaro. Sisteme kaj profunde kritikis Spinoza la ĝistiamajn filozofiojn kaj kredojn, kiuj kontraŭstaris de ĉiuj flankoj lian oponon. Spinoza preterpaŝis la dualisman filozofion de Descartes (Kartezio), kaj intuicie suriris la vojon al unueca (monisma) konsidero pri la mondo, la Naturo. La aŭtoro facilmane utiligas Esperanton por karakterizi kaj iel klarigi tiun filozofion duvizaĝan – samaspektan kia estis mem la nova burĝa klaso – kies universo estas jam materieca, tamen ankoraŭ restas panteisma dio-imago, identigita al la „ĉiomo", sed tute diferenca jam de la monoteisma dio-ideo.

Traktinte la vivon de Spinoza, kaj priskribinte lian veran homecon Goodheir devas kontentiĝi koncerne la grandan verkaron de la filozofo je skizaj klarigoj. Ke tiuj ofte subjektivas, tion motivas ankaŭ personaj simpatioj en si estimindaj, tamen la observema leganto trovos kontraŭdirojn ĉe la aŭtoro. Nuntempaj sociaj konfliktoj –

ankaŭ en Irlando ekzemple – aluditaj, manifestas koincidojn, eĉ falojn de malĝustaj pensmanieroj iamaj. Grave laŭdinde, ke Goodheir eminentas en vortuzo por terminoj, lerte spritas lia facile fluanta stilo, kio igas la legadon de lia libro vera plezuro.

E. *Fenyvesi*

Moderna poeto el la pasinta jarcento

Gérard de Nerval: Les Chimères – La Ĥimeroj. Dulingva eldono. Prezento kaj traduko de Gaston Waringhien. Eldonis: Plejado (Italio), 1976. 78 p., 20 X 14 cm.

Dulingva eldono por tradukisto ĉiam estas peza risko, ja li partoprenas nejustan konkurson: li konkursas kun la aŭtoro de la originala verko por la atento kaj aprobo de la leganto. La entrepreno povas ŝajni tute senespera por la tradukisto, kiam temas pri verko, kiel *La Ĥimeroj* de Nerval (1808–1855), ĉar – kiel Waringhien mem skribas en la antaŭparolo, „ju pli malgravas raciaj interrilatoj de la ideoj, intelekta signifo de la frazoj, des pli ĉefas la elvoka valoro de la silaboj aŭ vortoj kaj la kvazaŭa hipnota povo de la ritmo".

Waringhien plene sukcesis rekrei en Esperanto la „elvokan valoron" kaj „hipnotan povon" de la Nervalaj versoj. Ili ne fariĝis klaraj, la tradukinto ne murdis la sorĉon per prilumo de la ombropleneco de la originalo: legante liajn tradukojn oni havas la senton vagadi en korpreme ekscita nokta arbaro, kie oni ne vidas, nur konjektas la konturojn de la arboj, tamen, dank' al mistera forto, ne timas perdi la vojon.

La erudicia antaŭparolo kaj la detale precizaj notoj ebligas ĝisfundan komprenon de la poemoj eĉ por leganto kun nula anticipa kono pri Nerval.

V. *Benczik*

---

de la poemoj de Johannes Semper, unu el la plej elstaraj reprezentantoj de estona poezio, profunde emociigas. El konkretaj, realaj ekzemploj de la vivo Semper atingas filozofiajn konstatojn („Kiel vivus vi? "). Krom tio la poeto perfekte regas la versoformon.

Forte impresas la teneraj poemoj de Ilmi *Kolla,* la anhela voĉo de Paul-Eerik *Rummo,* la originala pensmaniero de Arvi *Siig.*

Ne mankas ankaŭ kelkaj malsukcesaj, deklarativaj poemoj, sed „Estona soveta poezio" reale respegulas preskaŭ la tutan komplikan evoluadon de la estona poezio dum la lastaj 30 jaroj.

Hilda Dresen posedas tre delikatan poezian senton, per kiu ŝi talente penetras en la intiman mondon de preskaŭ ĉiuj poetoj kaj majstre interpretas iliajn poemojn. La esprimoj estas tiel klaraj, la ritmo kaj melodio de la frazoj fluantaj, kaj estis momentoj en kiuj mi forgesis, ke mi legas tradukojn. Sed la tradukistino ne ĉiam sukcesis eviti kelkajn neologismojn, ekzemple „medfratino" en la poemo „Rapidhelpa aŭto" de Arvi Siig. Eble pli nature estus la uzo de la preciza Esperanta vorto „flegistino".

Por tiuj esperantistoj por kiuj la poezio estas vivneceso, tiu ĉi nova poemaro donos agrablajn horojn.

Georgi *Mihalkov*

„Izolo" represita

K. Kalocsay: Izolo. Originalaj poemoj. Antaŭparolo de William Auld. Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1977. 79 p., 18 X 12 cm. Bindita. Prezo: 16,50 ned. gld.

Izolo en la jaro 1939 estis la „spedeksepa libro eldonita de Literatura Mondo", tamen tiu tria poemaro de Kalocsay nur presiĝis, sed neniam atingis la publikon. Postrestis nur *kvin* ekzempleroj, kiujn Reto *Rossetti* savis por la postepoko. Laŭ unu el tiuj estis farita la nuna eldono, kiu espereble atingos pli grandan publikecon.

Izolo enhavas poemojn, verkitajn post la publikigo de *Streĉita Kordo,* plejparte el la jaroj 1936–38. La tuta volumeto estas protesto kontraŭ la izolo, kiun Kalocsay spertis kiel originala poeto: la nombro de regulaj legantoj de lia poezio certe ne superis centon. „Poeto sen popolo . . ." – li vekrias jam en *Streĉita Kordo,* kaj tiu soleco fakte daŭras, pro tio li eksilentas kiel poeto, kaj dediĉas sin al tradukaj, redaktaj kaj gramatikistaj laboroj. Tamen proksimiĝas la milito, kaj li devas sperti izolon ne nur kiel poeto, sed ankaŭ kiel humanisto: „. . . emerĝas ĥimeroj por apokalipsa rajdo". Kalocsay reprenas la plumon kaj kvazaŭ por si mem (tion verŝajnigas ankaŭ lia indiferento koncerne la sorton de la presita *Izolo*) verkas poemojn, surpaperigas siajn angoron kaj senesperon en mirinde artismaj, tamen skue sinceraj poemoj.

Sincera poemaro, tio povas esti la plej karakteriza trajto de *Izolo.* Kalocsay suverene, eble tro suverene regis la esperantan versarton, kaj pro tio li verkis tre multajn *bonajn* poemojn, kiuj ne malofte elspiras sterilan perfektecon. La nombro de liaj vere sinceraj poemoj eble ne superas dudekon – kaj almenaŭ duono de tiu dudeko troviĝas en *Izolo.*

El la kvar cikloj – *Verdstele, Malnovaj madrigaloj, Sur la monto Nebo, Japaneskoj* – la plej impresaj estas eble la tria kaj la kvara. En la tria li montras sin fervora predikanto de humanismo kaj amo, ŝajne havante kredon pri tio, ke el la ruinoj iam elkreskos nova vivo. Sed jam en *Japaneskoj* aperas preskaŭ kompleta senespero: en la tradicie kvietaj, kontemplaj, serenaj mallongaj japanaj formoj li priverkas teruraĵojn en tono jen senpasia, jen dolore grimaca.

Prave Auld skribas en sia antaŭparolo, ke „sen *Izolo* nia scio pri Kalocsay estus grave manka kaj dolore unuflanka". Al tiuj, kiuj ne povas aĉeti tiun ĉi novan libron, mi konsilas tralegi la dek sep poemojn, kiujn Kalocsay mem elektis el *Izolo* por la antologio *Ora Duopo.*

V. *Benczik*

MEDICOR MEDICOR



MEDICOR BUDAPEST

PRODUKTAS KAJ VENDAS MEDICOR MŰVEK.

La portebla diagnostikatoro de la Firmao Medicor (Medicor Művek) estas moderna, rapida, fidinda, multproduktiva kaj ĝi prezentas al la medicina tekniko aŭtomatizitajn diagnostikajn aparatojn.

La unuopaj atoroj estas taŭgaj por observi cerbajn elektrajn potencialojn, por indiki pulsonombron, mezuri sangopremon, por EKG-aj, aŭdiometriaj kaj pluraj aliaj esploroj.

LABORDOKUMENTOJ DE LA BUDAPEŜTA ESPERANTO-FAKO

Universitataj lernolibroj, sciencaj eldonaĵoj

Esperantologio estas relative nova, ankoraŭ malforta branĉo de la lingvokaj literaturscienco, tamen vivkapabla, ĉar zorgemaj manoj flegas ĝin en kelkaj laborcentroj de la mondo. Al tiuj apartenas – eble ni ne tro fieras dirante, ke al la plej efikaj el ili – la Esperanto-fako de la Budapeŝta Sciencuniversitato Eötvös Loránd.

Apud la instruado kaj edukado de novaj generacioj, la tasko de ĉiu universitata fako estas kulturado de la sciencobranĉo, pri kiu ĝi okupiĝas. La Esperanto-fako fondiĝis antaŭ dek unu jaroj; en la unua duono de tiu tempodaŭro kolektiĝis materiaj kaj spiritaj fortoj por eldono de lernolibroj, labordokumentoj. La pionirajn paŝojn faris kaj faras la fakgvidanto mem, sed jam maturiĝis la kondiĉoj, ke certajn laborojn instruantoj kaj gestudentoj efektivigu kune.

Kiel unua lernolibro de la fako, startis en 1972 la t.n. „universitata notaro" titolita: „Eszperantó: Bevezetés és nyelvgyakorlatok" ('E-o: Enkonduko kaj Lingvoekzercoj'), verko de prof-o I. Szerdahelyi, fakgvidanto. Tiu eldonaĵo havis ĉefe praktikan valoron, ĉar ĝi celis esti baza lernilo por la du unuaj studjaroj, samtempe donanta sufiĉajn lingvistikan kaj literaturan sciindaĵojn. Poste naskiĝis ege signifa kaj utila scienca verko de la sama aŭtoro: „Metodologio", kiu unue en Esperanto prilaboras la historion kaj teorion de metodiko de lingvoinstruado (laŭ fakuloj, eĉ la t.n. „mondlingvoj" – angla, franca, germana, rusa – ne disponas en Hungario pri simila instrumetodiko tiom detale prilaborita). Dua en la vico de eldonaĵoj, tiu Metodologio havas specifan mision: la pliriĉigon de fakaj konoj de niaj instruantoj. Tio estas primara tasko, ĉar pere de la instruado (lernado) edukiĝas la novaj esperantistaj generacioj.

La sekvaj tri volumoj de la sama serio – aperontaj ĉi-jare – en si mem formas apartan serion: temas pri la volumoj de Literatura Krestomatio, kies redaktado komenciĝis, daŭras kaj – espereble – estos ĝisdatigita. Granda, pozitivisma verko: ĝi kolektas la plej valorajn aŭ plej karakterizajn – sed nepre la plej konigendajn pecojn de la Esperanta literaturo; sed multe gravas, eble egalvaloras kun la literaturaĵoj, ankaŭ la indikaro pri verkoj kaj verkistoj.

Planoj? Ili estas multaj, ĉar ili ĝermas konstante. Ne malproksimiĝante de la realaĵoj, ni aŭdacas diri: baldaŭ estos pretaj la universitataj lernolibroj pri movadhistório, priskriba gramatiko kaj interlingvistiko.

La alia grupo de eldonaĵoj aperas sub la titolo: „Esperantologiaj Kajeroj". Praktika diferenco, kiu eble influas ankaŭ la enhavon de tiuj Kajeroj: la lernolibrojn eldonas la ŝtata Lernolibro-Eldonejo (Tankönyvkiadó), la E.K.-n la Universitato mem. Pro tio, la serio de lernolibroj devas esti pli planita; la propraj eldonaĵoj pretiĝas – kvankam laŭ bezono – iom „spontane": laŭeble kaj laŭ la aktualaĵoj. Kaj en la volumoj de la Esperantologiaj Kajeroj pli efektiviĝas la scienca, serioza kunlaboro de gestudentoj.

La Kajero 1., en 1976 – kiel „eksperimenta" volumo – plene sukcesis: dum kelkaj monatoj elĉerpiĝis la 500 ekzempleroj. Tio parte ŝuldiĝas al la novaĵo, sed plejparte al la nivelo de la libro, kiu arigas gramatikajn studojn verkitajn de laborkolektivo. Esplorinte certajn kampojn de E-a gramatiko, la studaro ankaŭ helpis en la verkado de priskriba gramatiko. La 2-a Kajero estas jubilea: ĝi estas dediĉita al la dekjara ekzistado de la fako, per publikigo de diverstemaj laboraĵoj de gestudentoj kaj la plena materialo de Interlingvistika kaj Esperantologia Konferenco, okazinta printempe de 1976 en Budapeŝt; krome, en ĉi tiu eldonaĵo legeblas la unua sintezo pri la dekjara historio de la fako. La eldonon de la 3-a Kajero motivis trista aktualaĵo, nome, la morto de la elstara hungara lingvisto kaj esperantologo, Géza *Bárczi,* kies karan memoron ni volis gardi ankaŭ pere de la kolektado de liaj artikoloj pri Esperanto kaj la lingva problemo. Ĉiuj artikoloj legeblas paralele hungare kaj en Esperanto.

Ok volumoj dum kvin jaroj. Kvankam laŭaspekte ili estas modestaj, sed kvalite bonaj, kaj kio pleje gravas: malmultekostaj. Kaj ni vidis jam malajn ekzemplojn, sufiĉas nur rigardi la prezojn de la SUK-eldonaĵoj, same sciencaj.

La Budapeŝtaj eldonaĵoj merite logas la esperantistojn al la aĉetado.

– VHZS –

INTERNACIA TEATRA RENKONTIGO

Inter la 27-a de majo kaj la 1-a de junio okazis en Gdansk (Pollando) la 1-a Internacia Teatra Renkontiĝo, la unua memstara aranĝo de la esperanta teatra arto. Tiu aranĝo pruvas la kreskantan interesiĝon de la movado al tiu ĉi tre grava tereno de la kultura aplikado de Esperanto.

La spektantoj povis ĝui la arton de la Pola Esperanto-Teatro (Kalina *Pienkiewicz* kaj Zbigniew *Dobrzynski)* kaj de la heroa solulino Jadwiga *Gibczyska.* Ili ludis en sia kutima alta nivelo, kaj „la hipnoto" de PET, kiel ankaŭ „Slavaj fabeloj", prezentita de *Gibczynska,* rikoltis grandan aplaŭdon.

Gastrolis ankaŭ la konata Pariza trupo, TESPA. Ĝi prezentis konatan verkon de *Ionesco,* „La kalvan kantistinon". La absurda verko estis trafa elekto por esperantista publiko, kaj ĝi sciis aprezi la sagacon de la trupo. Finna trupo prezentis fragmenton el „Kalevala" kaj unuaktaĵon de M. *Boulton.* Bedaŭrinde, la ĝena misprononcado de la finnaj aktoroj multe reduktis la ĝueblecon, precipe ĉe „Kalevala".

Jugoslavia trupo el Zagrebo prezentis senpretendan verketon de N. *Serment.* „La nevidebla Leonardo" ne estas granda verko, sed ĝia ĉarmo estis freŝa, agrabla, kelkfoje rava. El tiu ĉi trupo meritas nepre „laŭdan mencion" la senceremonia, tamen lerta kaj impresa ludo de la ĉarma 15-jara Saŝa *Sirovec* en la rolo de Maja.

-czik

Spegulo por la perfekta memekkono kaj konscia laboro

Esperanto-Dokumentoj, nova serio konsistanta el dek broŝuretoj, formato A5; abonebla ĉe landaj kotizperantoj aŭ rekte ĉe la eldoninto: de UEA. Abonprezo: 25 guldenoj por unu serio.

– Kiaj ni estas, kie estas loko de Esperanto inter la lingvoj de l'mondo, kiel staras nia afero, kiel povas kontribui nia movado al realigo de universalaj homaj celoj kaj al konkreta laboro de ties organizaĵoj, kian rolon havas aktuale, kaj povus plenumi nia lingvo, kiajn farendaĵojn ni havas ankoraŭ antau ni? – al tiuj demandoj respondas la unuopaj broŝuretoj de nova serio de Esperanto-Dokumentoj eldonitaj far UEA.

La serio anstataŭas dokumentojn antaŭe eldonitajn de CED. Krom Esperanto la serioj aperas ankaŭ en angla kaj franca lingvoj; enhavo de la diversaj serioj ne estas identa.

La unua esperantlingva serio jam aperis. La dek broŝuretoj aperintaj enhavas studojn, kiuj el diversaj vidpunktoj esploras kaj pritraktas aktualan situacion de nia lingvo, respektive tiujn de nia movado. Kelkaj titoloj: „Unesco kaj UEA, 1954–1974", „La kontribuo de UEA al la monda paco", „Esperanto tra la etero, 1922–1975", „Enkonduko al Esperanto-studoj", „La lingva problemo en la Europa Komunumaro" jam bone prezentas intencojn de la redaktoroj kaj eldonistoj de la serio: doni plenan bildon pri la atingitaj rezultoj kaj pri la pluaj taskoj starantaj antaŭ ni.

Inter la aŭtoroj la leganto trovas konatajn nomojn de aŭtoritatoj, kiel *H. Tonkin, W. Bormann, Claude Piron,* ktp. Ankaŭ hungarino surskribis sin al tiu ĉi listo de la aŭtoroj: la 9-an numeron kun titolo" Esperanto kaj la pliaĝuloj" verkis d-rino *Ilona Gál,* kiu en sia studo per apliko de psikologiaj kaj gerontologiaj vidpunktoj pritraktas la elektitan temon.

La laste aperinta, 10-a broŝureto enhavas lingvistikan studon de *Claude Piron:* „Esperanto ĉu Eŭropa aŭ Azia lingvo?" – estas scienca laboraĵo, tamen interesa ne nur por fakuloj, sed ankaŭ por ĉiu adepto de Lingvo Internacia.

Aperigo de la serio (kaj espereble de pluraj pluaj serioj) ŝtopas gravan breĉon. Tiaspecajn studojn ja nia gazetaro (precipe pro amplekso de la verkoj) nur malofte publikigas; do se tiu ĉi serio ne ekzistus – nepre ni devus elpensi kaj realigi ĝin.

Sekve, la serion ni rekomendas al ĉiuj esperantistoj por legi, studi, kaj uzi propagandcele, same ni rekomendas traduki certajn studojn aperintajn en la serio al naciaj lingvoj kaj popularigi ilin ankaŭ en la diverslingva nacia gazetaro, kiel faros tion ankaŭ Világ és Nyelv, hungarlingva revuo de HEA.

M. F.

Szilárd Bálint

La ideala edzino

Bela, juna knabino kaj eleganta viro staris antaŭ la matrikulisto. Sur la benkoj sidis multaj parencoj, geamikoj kaj konatoj. Mallaŭte sonis solena muziko, brile flagris kandeloj.

Laŭ la ceremonia kutimo la matrikulisto unue sin turnis al la fianĉo:

– Ĉu vi deklaras, ke vi volas edziĝi al Gizela Kiŝ?

– Jes! – sonis la decida respondo.

La matrikulisto nun demandis la fianĉinon:

– Ĉu vi deklaras, ke vi volas edziniĝi al Johano Fekete?

– Ne! – sonis la same decida respondo...

En la vicoj de la ĉeestantoj estis aŭdebla konsterna muĝado. La matrikulisto pensis, ke li eble ne bone aŭdis la respondon, kaj tial li ripetis la demandon. La respondo denove estis decida „ne". Fine la matrikulisto manifestis, ke li ne povas leĝigi la geedziĝon.

La du rolantoj de la vanigita geedziĝo lasis unu la alian, kaj foriris kun la nupta festantaro.

Post kvaronhoro estis aŭdebla energia frapado ĉe la pordo de la matrikulisto. En la pordaperturo aperis Gizela.

– Mi petas pardonon, ke mi ĝenas vin, sed mi dezirus priparoli ion kun vi... Tiu viro, al kiu mi diris „ne", ne estis mia vera fianĉo, ĉar tiu atendas min en la koridoro...

– Mi komprenas nenion... – diris la surprizita matrikulisto.

– Do, mi petas vin, bonvolu forstreki la nomon de mia pli frua fianĉo, kaj anstataŭ ĝi enskribi la nomon de la alia...

La matrikulisto ne konsentis la strangan interŝanĝon, kaj konsilis tion, ke ili ambaŭ denove anonciĝu por la nova geedziĝo, kaj post la laŭleĝa unumonata atendado nenio malhelpos, ke ili fariĝu geedzoj.

Tiel okazis. Post monato sen parencoj, sen konatoj, sen granda ceremonio okazis la geedziĝo. La du atestantoj estis nekonataj kamenskrapisto kaj fajrobrigadisto.

Pasis la tagoj. Petro, la juna edzo diligente laboris, eĉ hejme ĉiam helpis al Gizela fari la hejman laboron. Por Petro la labortempo komencigis je la sepa, por Gizela je la naŭa. Do, Petro venis hejmen du horojn pli frue, ol lia edzino. Li enuis. Hejmenirante la bonaj kolegoj invitis lin viziti drinkejon. Unue li ne havis emon por tio, tamen poste li sidiĝis al la blanka tablo de la restoracio, kaj trinkis kun la aliaj. Fine antaŭ la pordo de la loĝejo li kantis laŭte:

Pendas kapo de l' ĉevalid',
ne malĝoju pro l' knabin-perfid'...

Gizela surprizite malfermis la pordon:

– Kio okazis al vi? – ŝi demandis.

Petro enŝanceliĝadis en la ĉambron kaj enveste falis sur la liton, kaj intertempe li murmuris: – Pendas kapo...la ĉevalid'...

Gizela senvorte senvestigis lin kaj metis akvan fomenton sur la frunton de la edzo. Matene Petro konfesis, ke kun la kolegoj ili festis nomtagon. Poste dum kelkaj tagoj ĉio estis en bona ordo, li hontis. Sed ĉiam pli ofte okazadis naskotagoj, promocioj kaj diversaj motivoj por trinki. Ofte okazis, ke la amikoj lin kondukis hejmen, kaj ili devis ekkapti lin sur la lito, ĉar Petro automate leviĝis kaj volis reiri al la restoracio. Gizela senvorte flegis lin, kaj matene ŝi faris neniun riproĉon.

Post kelkaj semajnoj ŝi komencis idealan kuracmetodon por sia edzo. Kiam la hejmenkondukintaj drinkamikoj foriris kaj Petro trankviliĝis, ŝi prenis la balailon kaj trabatis lin. Matene, kiam Petro leviĝis, li fartis malbone, havis bluajn-verdajn makulojn, kaj la postsignoj de la trabatado tre doloris. Kun surprizo li vidis, ke Gizela flegas lin, fomentas kaj pansas la vundojn.

– Mia kara, kio okazis al vi? – ŝi demandis milde.

– Mi scias nenion... mi rememoras pri nenio... mi kondutis bone en la restoracio, en amika rondo... – li respondis.

Nur trifoje Gizela devis ripeti la strangan kuracadon, kaj Petro tute evitis la restoracion. Li ĉiam cerbumis, kiel povis okazi, ke oni trabatis lin, kaj kial... kaj kie?

La gepatroj de Gizela en fora, eta vilaĝo laŭte legis ŝian leteron al la najbaroj kaj diris:

– Tre bone elektis edzon Gizela... ĉar Petro diligente laboras... kaj tute ne trinkas alkoholaĵojn...

AGORDU LA BRUSTOJN!

Ni citas el la fama poemo de la „patro de la poezio". Ensendi sufiĉas nur la citaĵon ĝis la 1a de septembro. Inter la solvintoj ni lotumos librojn.



HORIZONTALE: 1. Kurta literaturaĵo (R) 4. *La unua vico de la citaĵo* 13. Entrepreno kun monprofito 14. Malfleksebla 15. Teheranujo (!) 16. Epiteto kaj de mezvojo kaj de gefianĉa ringo 18. Ŝirmloko de raba kvarpiedulo (–o) 19. Ĉiu devas fosi tion (R) 20. Ornamo de dezertoj 22. Rilata al ujo el ŝnurteksaĵo 23. La klubo de J. Baghy 24. Por orientigo 26. Speco de sturno, kun rozkolora ventro kaj dorso (R). 27. Signo de nobelio 28. Granda Aŭstralia birdo 29. Rivero ĉe Zaragoza 31. Sulfuro kaj hidrogeno 32. Skrapi teron 33. Agrokultura 35. Oferejo (R) 36. Iama turka soldatrango (R) 37. Kotizoj 38. Enkarcerigi 40. Virina nomo 41. Natrio 43. Esperantista scienca mondasocio 44. Laŭtegi konfuze 45. Dufoje: ismo je la jarcentturno (!) 46. Simboloj de iridio kaj kalio 48. Havas sentencon. 50. Tabelvorto 51. Kemia elemento el la vanadiogrupo (Nb) 53. Japana kronikinto pri la „infanoj de l' atombombo" (Arata) 54. Virnomo (R) 55. Malbona ŝanco (R) 57. Mangano kaj oksigeno 58. Disĵetita (–a) 59. Esti tute simila, sama 61. Nevidebla, ŝirmata.

VERTIKALE: 2. Fermilo 3. Samgrada 4. Kalkaĵo de helikoj kaj ostroj (R) 5. Sufikso por esprimi familinomon de kelkaj kreskaĵspecoj (+o) 6. La 13a litero de la Esperanto-alfabeto 7. Maro en Eŭropo 8. Parteto (R) 9. Virido (R) 10. Instigus 11. Ekzemple: Zeŭso kaj Hera (–o) 12. Flegas vegetaĵon 13. *La dua vico de la citaĵo* 16. Sengepatrulo 17. Tre tranĉa, pika 20. Malinteresiĝi 21. Mallumo (R) 24. Influo sur la sentumoj 25. Elstarulo de la humanismo Desiderius Rotterdamus, 1466–1536). 28. Malĝuste opinii. 30. Kovri per nobla metalo. 32. Malgranda 33. Labori, lukti 34. Rilata al la plej bela homa sento 36. „Sendiismo" (R) 39. Purigilo 40. Epoka 42. Kantado 44. „Perlo" el vitro 45. Elbuŝigita 47. Vojaĉo sen pavimo (–o) 49. Sud-Amerika strutosimila brido (R) 50. Japana matraco (R) 52. Hordo, trupo (R) 54. Kutima ago de dormanto 56. LTE 58. Titolo de la reganto en Irano (R) 60. Instrument' 61. Kaj aliaj

Imre *Szabó*

STRATO ESPERANTO N-RO 1.

6a etaĝo

19.	20.	21.
L. ZAMENHOF	K. KALOCSAI	K. BEIN

5a etaĝo

16.	17.	18.
KABE	E. BARANYAI	J. BAGHY

4a etaĝo

13.	14.	15.
W. AULD	J. FETHKE	UNUEL

3a etaĝo

10.	11.	12.
B. MANTO	EMBA	F. ZAMENHOF

2a etaĝo

7.	8.	9.
FEZ	J. FORGE	KOPAR'

1a etaĝo

4.	5.	6.
T. JUNG	L. TOTSCHE	B. MIRSKI

Teretaĝo

1.	2.	3.
H. HOLDER	G. WARINGHIEN	L. TÁRKONY

Kara Leganto! Vi vidas la tabulon pri la loĝantoj en strato Esperanto n-ro 1. Kiel vi jam rimarkis, la loĝejojn luas famaj esperantistoj. Tralegu la nomaron kaj konstatu: fakte kiom da esperantistoj loĝas tie! (Kelkaj uzas ja pseŭdonimon!) Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

La solvo de litero-stelo (HV 1977/6).

Kvankam nia gazeto aperis tro malfrue, tamen alvenis kelkaj solvoj. Verdire nun furoris niaj ĉeĥoslovakaj kamaradoj. Elstaras *Adolf STANURA,* kiu trovis la plej longan vorton *Esperantio,* kaj povis ellegi la plej multjan vortojn, laŭnombre: 127! Ankaŭ *Miroslav HROMAS* lertis: lia vortsumo estis 55. Ambaŭ ricevis libropremion.

La ĝusta solvo de nia krucenigmo aperinta en la 6-a numero de Hungara Vivo estas:

„Tondru respond' venkante minacon:
Ne plu militon! Pacon! Nur pacon!"

Per lotumado *libropremion gajnis*: Linde KNÖSCHKE (GDR), Viktoro AROLOVIĈ (Soveta Unio) kaj FOGARASSY Gábor (Hungario). Gratulon al ili!

KORESPONDI DEZIRAS

RONDVETURO: Tra Grekio kaj Turkio per aŭtomobilo – kunvojaĝantino serĉata, kiu eltenas lacigajn veturprogramojn, (ĉ.40 j.), kaj havas permeson konduki aŭton. Valeria *Végi*, H–1195 *Budapeŝto*, Vörösoktóber u. 11.

INTERŜANĜAS: kun tm. diskoj, kolorbk, pm, ins. s-ro Laimius Strāznickas (19), intereso moderna muziko, lingvoj, trovi sincerajn geamikojn. SU-Litovio 234580 *Alytus*, Topoliu 4–41. – Bk. de artfilmoj klas. kaj novaj, s-ro Jurij *Fedorov*, SU–310.023 *Harkov*, str. Vesniva 2A/2.

D-ro inĝ. (akvomastrumo) Wolfgang *Müller*, (45) kun samaĝuloj pĉt. DDR–20 *Neubrandenburg*, Petrosavodsker str. 62. – Eŭgeno *Georgiev* (23) kun spertaj gejunuloj ktm, pct, literaturo, filmoj, E-movado, bk, resp. certa. BG–1202 *Sofio* Str. Baĉo Kiro 35. II. – Karl *Felkel* (44) ktm, pri ŝako, fiŝkaptado k.a. DDR–2082 *Feldberg*, Haus am See.

s-ro Rumen Raev *Dimitrov* (30) kun fraŭlinoj el Budapeŝto, BG–1504 *Sofio* Str. Dim. Poljanov No. 1. – Krystyna *Kuczinska* (18) lernantino ktm. pri moderna muziko, sporto, turismo, kino, teatro. – PL58–160 *Swiebodzice*, Os. Przod, Pracy 2a/12.

s-ro Krystian *Brachaczek* (24), kun samaĝuloj en tm., hobio vojaĝo, kol. bk, urboplanojn kaj diskojn. PL–44–100 *Gliwice* ul. Powstanców W–Wy 6/1. – Studenta E-Rondo (Medicina Akademio) kun similaj rondoj en tm. pri sciencaj probl., turismo, reciproka gastigado ktp. RUSZSP, *Wroclavo*, ul. Sklodowskiej Curie 65. Pollando. –

en sia originala formo estas preskaŭ 600-paĝa romano de Mór *Jókai*. Ĝi revivigas la glorajn tagojn de la revolucio kaj liberbatalo dum la jaroj 1848/1849 en Hungario. Tamen, ne temas pri historia fakverko, sed intereskapta, atentkatena beletra legaĵo.

Tiu longa romano estis koncizigita je formo de bildrakonto, konsistanta el preskaŭ 400 desegnaĵoj, kiuj stile harmonias kun la enhavo. La lingvaĵo de la verko estas simpla, facile komprenebla ankaŭ por komencantoj.

La kovrilpaĝon ornamas kolora foto, prenita el la filmo, kiun oni faris antau kelkaj jaroj laŭ la romano.

64 p., 24 X 17 cm. Prezo: 6,– ned. gld.

GRAVA INFORMO

Ni povas anonci, ke ĉiuj libroj, eldonitaj de Hungara-Esperanto-Asocio, estas aĉeteblaj sen limigo en Bulgario, Ĉeĥoslovakio kaj GDR. Esperantistoj en la koncernaj landoj turnu sin al sia landa asocio. En aliaj socialismaj landoj tiuj niaj legantoj, kiuj abonas HV pere de ne-ŝtata peranto, ĉe la sama peranto povas mendi ankaŭ librojn, eldonitajn en Hungario.

Esperantistoj en ne-socialismaj landoj povas mendi tiujn librojn ĉe la Libroservo de UEA, ĉe sia kutima esperantista libroservo aŭ rekte ĉe Hungara Esperanto-Asocio.

Hungaroj mendu, respektive abonu la librojn laŭ la maniero anoncita en Budapeŝta Informilo kaj tiutemaj cirkuleroj.

Ĉefredaktoro: *Vilmos Benczik*

Responda redaktoro: *d-ro István Nagy*

Arta redaktoro: *Éva Farkas-Tatár*

Redaktoraro:

Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits.

Ĉefkunlaborantoj:

Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony.

Redakcio: Budapest VIII., Kenyérmező u. 6. Telefono: 141–078, 334–194

Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio

Responda eldonisto: Tibor Vaskó

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215–96 162 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.–, al eksterlando krome Ft. 9,60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA, H–1389 Budapest P.O.B. 149

Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,– Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto

78-7079 Somogy m. Nyomda 3500
Responda gvidanto: Béla Farkas direktoro

Indexszám: 25 377

ISSN 0018–7704

PANNONIA Eksterkomerca Entrepreno de UZINOJ CSEPEL

1062 Budapest, VI., Bajza u. 26. Telegramadreso: PANEXPORT Budapest
Telefono: 228–850 Teletajpilo: 225128 PANEX–H, Poŝta adreso: 1394 Budapest, P.f. 354

EKSPORTO:

- Fajnmetalurgiaj duonfabrikaĵoj por telekomunikada tekniko, elektra kaj elektrona industrioj
- Inkandeskaj elektrodoj kaj kablokerno por pretigo de elektrodoj de temperature regulita fandofitingo[1]
- Ŝtaltuboj
  Ŝtalboteloj por oksigeno ktp.
  Bicikloj por sinjoroj, sinjorinoj kaj infanoj (aŭ: viroj, virinoj kaj infanoj)
  Biciklo-konsistaĵoj
- Maŝinoj por la konfekcioindustrio
  – Elektraj tajladmaŝinoj
  – Kudromaŝinoj
  – Gladmaŝinoj
  – Gladilaro
  Specialaj maŝinoj kaj iliaj subtipoj
- Maŝinoj por lavejoj kaj por la teksaĵpuriga industrio
- Kompletaj konfekcio-instalaĵoj por teksaĵ- kaj led-konfekcio-industrioj
- Kompletaj lavejoj kaj vestpurigejoj
- Transportinstalaĵoj por konfekcio-fabrikoj kaj lavejoj
- Prilabormaŝinoj por tuboj kaj stangoj
  – Pintigmaŝinoj
  – Tub-rektigaj, fleksaj maŝinoj
  – Longigaŭtomatoj por tuboj kaj stangoj
- Spiraltub-veldejoj
- Maŝinoj kaj uzinoj por produktado de senfugaj tuboj
- Maŝinoj kaj uzinoj por ŝtalbotel-fabrikado
- Maŝinoj kaj uzinoj por pretigo de arklum-veld-elektrodoj
- Instalaĵoj kaj uzinoj por pretigi biciklo-konstruerojn, kaj por muntadi biciklojn
- Konigo de *Know-How*[2] kaj teknologio, instrukcioj por fakpersonaro

[1] **fitingo** (PIV): kuniga interorgano (mufo, krano) de tubokondukiloj (por brulgaso, akvo); interĝustiga tubo vaporkondukaj tuboj.

[2] **Know-How**: fabrikad-teknologio, „scii kiel"

Tr. Alfonso *Pechan*

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANGEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért